

eLIBRO

La matena ĉielruĝo komencas kolorigi la ĉielon super la Sipunmontoj; la malhelblua martavolo forĵetis la noktan malhelon kaj atendas la unuan sunradion por ekbrili. De la golfo venas malvarmo kaj nebulo. Ne estas neĝo — ĉio estas nigra, sed la akra matena frostoj pinĉas la vizaĝon kaj krakas sub la piedoj.

Uzino 6



INKO

UZINO 6

Legolibro kun originala

kaj tradukita beletro

Redaktis Franko Luin

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-202-6

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

MAJO 2003

Enhavo

Pri Uzino	4
Sebastopolo en decembro de la jaro 1854 (<i>Lev Tolstoj</i>)	5
Ĉe l'entombigo de l'povra Aleksandro (<i>Guy de Maupassant</i>)	18
Ĉu ekzistas anĝeloj? (5) (<i>John Einar Åberg</i>)	30
La maskofesto de Ruĝa morto (<i>Edgar Allan Poe</i>)	43
Muneto Abe (<i>K. Takahaŝi</i>)	53
La malfeliĉa fianĉo de Aŭrelia (<i>Mark Twain</i>)	70
La rakonto de la infano (<i>Charles Dickens</i>)	75
Mortintaj folioj (<i>Anna Mar</i>)	82
La ambicia gasto (<i>Nathaniel Hawthorne</i>)	93

Pri Uzino

Uzino estas legolibro kun variaj prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.

Ĉiu Uzino estos minimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al uzino@omnibus.se.

Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.

Franko Luin

Sebastopolo en decembro de la jaro 1854

La matena ĉielruĝo komencas kolorigi la ĉielon super la Sipunmontoj; la malhelblua martavolo forĵetis la noktan malhelon kaj atendas la unuan sunradion por ekbrili. De la golfo venas malvarmo kaj nebulo. Ne estas neĝo — ĉio estas nigra, sed la akra matena frostoj pinĉas la vizaĝon kaj krakas sub la piedoj. La malproksima, neniam silentiĝanta muĝo de la maro rompas la silenton de la mateno. Estas silente sur la ŝipoj, batas la oka.

Sur la norda flanko de Sebastopolo la taga bruoj komencas iom post iom anstataŭi la noktan kvieton: ie pasas patrolo, tintante per pafiloj; ie doktoro jam rapidas al malsanulejo; ie soldato elrampis el la terloĝejo, lavas la sunbrunigitan vizaĝon per glacia akvo kaj, sin turnante orienten kaj rapide farante krucosignojn, preĝas al Dio; ie alta, tre peza maĝaro¹ kun kameloj traveturas knare tombejon por enterigi sangokovritajn mortintojn,

1 tataro veturilo

da kiuj ĝi estas plena preskaŭ ĝis la supro . . . Mi venas al la haveno, — specialaodoro de ŝtonkarbo, de sterko, de malseko kaj viando trafas min; miloj da diversaj objektoj — hejtligno, viando, terkorboj, faruno, fero kaj tiel plu — amase kuŝas sur la kajo; soldatoj de diversaj regimentoj, kun sakoj kaj pafiloj, sen sakoj kaj sen pafiloj, amasiĝas ĉi tie, fumas, insultas unu la alian, transportas ŝarĝojn sur vaporŝipon, kiu, eligante fumon, staras apud la kajponto; privataj jalikoj², plenaj de diversaj homoj — soldatoj, maristoj, komercistoj, virinoj — alkajiĝas kaj dekajiĝas.

—Via moŝto, sur la Grafan³, se taŭgas al vi! — krias du aŭ tri eksaj militŝipanoj kaj levas sin en la jalikoj.

Mi elektas tiun, kiu estis plej proksima, paŝas trans duonputrinta kadavro de ruĝbruna ĉevalo, kiu kuŝas tie en la koto apud la ŝipeto, kaj sidiĝas ĉe la direktilo. Mi dekajiĝas. Ĉirkaŭe la maro estas jam brilanta en la matena suno, antaŭe sidas maljuna maristo en kamellana supervesto kaj juna blondhara knabo, kiu remas silente, fervore. Mi rigardas ĉiujn ŝipojn kaj ŝipetojn, kiuj estas dismetitaj ĉirkaŭe en la golfo; kaj malamikaj ŝipoj vidiĝas malproksime en la maro.

Ni alkajiĝas ĉe la Grafa kajo, kie jam amasas diversaj ŝipetoj.

2 malgranda ŝipeto

3 kajo en Sebastopolo

Sur la kajo brue movetiĝas amasoj da grize vestitaj soldatoj, nigre vestitaj maristoj kaj diverskolore vestitaj virinoj. Virinoj vendas bulkojn, viroj kun samovaroj krias: Varmega sbiteno⁴! kaj ĉie, sur la unuaj ŝtupoj, senorde kuŝas rustiĝintaj kuglegoj, bomboj, kartoĉoj kaj kanonoj el fandita fero; iom pli malproksime estas granda placo, sur kiu senorde kuŝas grandegaj ŝtupoj, kanonaj stabloj, dormantaj soldatoj, staras ĉevaloj, veturiloj, verdaj kestoj kaj kanonoj; moviĝas soldatoj, maristoj, oficiroj, virinoj, infanoj kaj komercistoj, veturas veturiloj kun fojno, kun matsakoj kaj kun bareloj; ie trarajdas kazako kaj oficiro, traveturas generalo. Je la dekstra flanko la strato estas barita de kanonoj kaj apud ili sidas maristo, fumanta pipon. Maldekstre, apud domo, staras soldatoj kaj sangokovritaj portiloj, — malamikaj postsignoj de la milita tempo videblas ĉie.

Komence ŝajnis al mi, ke ĉiuj estas timigitaj, maltrankviliĝas, ne scias, kion fari. Sed kiam mi enrigardis pli proksime la vizaĝojn de ĉi tiuj homoj, mi komprenis ion tute alian. Jen soldato kondukas trinkigi ruĝbrunan ĉevaltrion kaj tiel trankvile murmuris ion, ke, videble, li ne perdis la vojon en ĉi tiu homamaso, sed plenumas sian aferon same trankvile, kiel dum la paca tempo. La samo videblas sur la vizaĝo de oficiro, kiu preterpasas, kaj sur

4 rusa miela zingibra trinkaĵo

la vizaĝo de maristo, kiu fumas sidante apud kanono, kaj sur la vizaĝoj de soldatoj laboristoj, atendantaj kun portiloj sur perono de malsanulejo, kaj sur la vizaĝo de ĉi tiu virino, kiu, ne timante malsekigi sian veston, transsaltas straton laŭ ŝtonetoj.

Vane mi serĉis maltrankviliĝon, konsterniĝon aŭ pretiĝon al morto, — nenio tia estis; mi vidis homojn, trankvile sin okupantaj je siaj ĉiutagaj aferoj. Sed mi ekvidis tie ne ĉiutagajn simplajn aferojn, sed terurajn, malĝojajn, miregindajn scenojn.

Mi eniris grandan ĉambron. Tuj kiam mi malfermis la pordon, la vido kaj odoro de kvardek aŭ kvindek plej malfacile vunditaj malsanuloj, — iuj sur litoj, aliaj rekte sur planko — subite frapis min. Fariĝis al mi malagrabla kaj mi preskaŭ ekhontis, ke mi ekiris por rigardi suferulojn, sed mi rememoris, kiel malfeliĉaj homoj ŝatas, kiam oni vizitas ilin, kiel ili amas rakonti pri siaj suferoj kaj aŭdi vortojn de amo kaj de kompatado, kaj mi eniris.

—Kie vi estas vundita? mi demandis hezitante kaj timeme maljunan malgrasiĝintan soldaton, kiu, sidante sur lito, bonanime rigardis min kaj kvazaŭ invitis min aliri lin.

—En la kruro, — respondas la soldato.

Kaj mi rimarkis laŭ la faldoj de la litkovrilo, ke la kruro estas amputita super la genuo.

—Dank'al Dio nun, — li aldonas, —mi volas forlasi la malsanulejon.

—Ĉu antaŭ longe vi estis vundita?

—Jes, pasas la sesa semajno, via moŝto.

—Ĉu doloras nun via kruro?

—Ne, nun ĝi ne doloras; ĝi nur doloretas iom en la tibikarno, dum malbona vetero . . .

—Kie vi estis vundita?

—Sur la kvina bastiono, via moŝto, kiam estis la unua bombado: mi ekcelis kanonon, komencis deiri, kaj io batis min je la kruro, mi kvazaŭ faletis per unu kruro en kavon, — mi rigardas, la kruro forestas.

—Ĉu efektive ne estis dolorige tiun unuan minuton?

—Ne; nur kvazaŭ per io varmega oni puŝis min je la kruro.

—Kaj poste?

—Poste ankaŭ ne estis dolorige. Nur kiam oni komencis surtiri la haŭton preskaŭ bruldoloretis. La ĉefa afero estas, via moŝto, pensi nenion; se oni ne pensas, nenio sentiĝas. Plej multe ĉio venas de tio, ke homo pensas.

Dum tiu tempo aliris min virino en griza vesto, kun nigra tuko sur la kapo; ŝi enmiksiĝas en mian interparolon kun la maristo kaj komencas rakonti pri li kaj pri tio, kiel terure li suferis kvar tutajn semajnojn.

—Ŝi estas mia edzino, via moŝto! diras la maristo kun tia mieno, kiel se li dirus: "Vi jam pardonu ŝin. Certe, la virino kortuŝiĝis".

—Nu, Dio igu vin resaniĝi kiel eble plej baldaŭ, — kaj mi aliris alian malsanulon. Li kuŝis sur la planko kaj ŝajnis atendi morton en netolereblaj suferoj.

Li kuŝis sur la dorso, ĵetinte malantaŭen la maldekstran brakon. Lia pala vizaĝo havas mienon de grandaj suferoj; la seka malfermita buŝo malfacile eligas ster-torantan spiradon; bluaj senmovaj okuloj estas supren-rulitaj, kaj de sub la kovrilo elstariĝas restaĵo de la dekstra brako, ĉirkaŭvolvita per ĉifonoj. Malbonodoro de kadavro frapis min, kaj konsumanta interna varmego de la suferulo preskaŭ eniĝas ankaŭ en min.

—Ĉu li estas sen konscio? — mi demandis la virinon, kiu iras post mi kaj rigardas min afable, kiel parencon.

—Ne ankoraŭ, li aŭdas, sed lia stato estas tre danĝera, — ŝi aldonas murmurite.

—Mi trinkigis lin hodiaŭ per teo: kvankam li ne estas parenca al mi, tamen necesas havi kompaton, — sed li preskaŭ ne trinkis.

—Kiel vi sentas vin? — mi demandis al li.

La vundito turnas la okulojn al mia voĉo, sed ne vidas kaj ne komprenas min.

—Brulas en la koro . . .

Iom pli malproksime mi ekvidis maljunan soldaton, kiu ŝanĝas tolaĵon. Lia vizaĝo kaj korpo estas de ia brun-koloro kaj malgrasaj kiel skeleto. Tuta brako mankas; ĝi estas amputita en la humera artikolo. Li ridas vikle, — li resaniĝis.

De alia flanko mi vidis sur lito suferoplenan, palan kaj delikatan vizaĝon de virino; sur la vizaĝo estas febra ruĝo je tutaj vangoj.

—Ŝi estas edzino de maristo; antaŭ nelonge bombo trafis ŝian kruron, — diras al mi tiu virino, kiu iris post mi.

—Ŝi estis portanta tagmanĝon al la edzo sur bastionon.

—Ĉu oni amputis?

—Oni amputis super la genuo.

Mi pasis maldekstren tra pordo: en tiu ĉambro oni bandaĝas kaj operacias. Mi ekvidis tie kuracistojn kun brakoj sangokovritaj ĝis kubutoj, kun palaj malgajaj vizaĝoj; ili sin okupis apud lito, sur kiu kuŝis vundito kun malfermitaj okuloj, parolanta, kvazaŭ en deliro, sensencajn, foje simplajn kaj kortuŝajn vortojn. La kuracistoj sin okupas de abomena, sed bonfara afero. Akra kurba tranĉilo eniĝas en blankan sanan korpon: la vundito subite rekonsciiĝas kun terura krio, disŝiranta animon, kaj kun malbenoj; mi vidis, kiel kuracista helpanto ĵetis en angulon la detranĉitan brakon; mi vidis, kiel alia vundito

kuŝas sur portilo en la sama ĉambro kaj, rigardante la operacion de la kamarado, tordiĝas en konvulsioj kaj ĝemas ne tiom pro doloro, kiom pro atendo, — mi vidis terurajn frapantajn scenojn.

Elirante el ĉi tiu domo de suferoj mi eksentis trankviliĝon, mi enspiris pli profunde freŝan aeron, eksentis mian sanon, sed kune kun tio, rememorante la suferojn, mi eksentis mian sensignifon.

”Kion signifas morto kaj suferoj de tia sensignifa vermo kiel mi, kompare kun tiomaj mortoj, kun tiomaj suferoj? . . .”

Mi ekiris al la bastionoj . . . Enteriga procesio renkontiĝis kun mi; aŭdiĝas pafado de la bastionoj.

Mi eniris restoracion por aŭskulti paroladojn de maristoj kaj oficiroj; fakte, tie oni jam rakontas pri la pasinta nokto, pri batalo je la dudek kvara, pri tio, kiel multekosta kaj malbona estas la nutraĵo, kaj pri tio, kiel estis mortigita tiu aŭ alia kamarado sur la kvara bastiono⁵.

Kaj mi volis iri plej baldaŭ sur la bastionojn, nome sur la kvaran, pri kiu oni rakontadis tiel multe. Mi eliris el la restoracio, supreniris surmonten laŭ granda strato. La domoj ambaŭflanke de la strato estas ruinigitaj, elpendaĵoj mankas, la pordoj estas fermitaj per tabuloj, la fenestroj estas disbatitaj, ie angulo de muro estas forbatita

5 Ĝi estis la plej danĝera loko en Sebastopolo.

de kuglego, ie tegmento estas trabatita. Laŭvoje mi stumblas sur kuglegoj, senorde kuŝantaj, kaj falas en kavojn plenaj de akvo kaj elfositaj en ŝtona grundo de bomboj. Sur la strato mi renkontas kaj preteriras soldatojn, oficirojn; iafoje renkontiĝas virino aŭ infano, sed virino — ne plu kun ĉapelo, sed edzino de maristo — en malnova pelteto kaj en soldataj botoj. Pasante pluen laŭ la strato kaj veninte malsupren de la monto, mi rimarkas ĉirkaŭ mi ne plu domojn, sed strangajn ruinojn el ŝtonoj, tabuloj, argilo, traboj; antaŭ mi, sur kruta monto, mi vidas nigran kotan lokon, elfositan per kavkanaloj, kaj ĝi estas la kvara bastiono . . . Tie ĉi mi renkontas ankoraŭ malpli da homoj; virinoj tute ne estas vidataj, la soldatoj iras rapide, gutoj de sango troveblas sur la vojo, kaj ĉi tie mi renkontas kvar soldatojn kun portilo kaj sur la portilo — palflava vizaĝo kaj sangokovrita soldata mantelo. Se mi demandus: "Kie li estas vundita?" — la portistoj dirus kolere sen turni sin al mi: "En kruron aŭ brakon", se li estas malgrave vundita; aŭ ili silentus malafable, se la vizaĝo jam estas kovrita kaj li jam mortis aŭ estas grave vundita.

Proksima fajfo de kuglego aŭ bombo, kiam mi komencis iri surmonten, malagrabla konsternis min.

Apenaŭ mi iom supreniris la monton kugloj komencis fajfi dekstre kaj maldekstre de mi, kaj mi eĉ ekmedi-

tis, ĉu estas pli bone iri laŭ la tranĉeo⁶; sed la tranĉeo estas plena de fluida flava malbonodoranta koto, pli alte ol ĝisgenue, tiel ke mi elektis vojon sur la monto, des pli ke, kiel mi vidas, ĉiuj iras laŭ la vojo. Farinte ducent paŝojn mi eliris sur kotan lokon, ĉirkaŭitan ĉiuflanke de teramasoj; kun pulvaj keloj, terloĝejoj; kaj sur la teramasoj staras grandaj ferfandaĵaj kanonoj kaj kuglegoj. Ĉio ĉi ŝajnis al mi dismetita sen ia ordo: ie amaseto da maristoj sidas sur baterio; ie meze de placo kuŝas disbatita kanono, duone droninta en la koto; ie infanteria soldato kun pafilo transiras baterion kaj kun malfacileco eltiradas la piedojn el la glua koto. Ĉie, ĉiuflanke, en la fluida glua koto, kuŝas neeksplozivitaj bomboj, kuglegoj; aŭdiĝas fajfado de kugloj kaj terura fajfego de la pafado.

”Jen kia ĝi estas, la kvara bastiono, jen ĝi — tiu ĉi timiga, fakte terura loko!” mi pensis. Sed tio ankoraŭ ne estis la kvara bastiono. Tio estas la Jazona reduto, — loko kompare tre sendanĝera kaj tute ne terura. Por atingi la kvaran bastionon necesas sin direkti dekstren laŭ ĉi tiu mallarĝa tranĉeo, laŭ kiu la infanteria soldato ekiris, sin klininte. En ĉi tiu tranĉeo mi renkontis denove portilon, mariston, soldatojn kun fosiloj, kotajn terloĝejojn, kien nur du homoj povas enrampi, sin fleksinte; mi vidis ĉi tie denove la saman malbonodorantan koton kaj

6 kavkanalo, elfosita por pasi pli sendanĝere al baterioj

diversajn disrompaĵojn de ferfandaĵo. Pasinte ankoraŭ tricent paŝojn mi eliris sur baterion — sur placeton, elfositan je kavoj, kun kanonoj kaj teraj remparoj. Ĉi tie mi ekvidis kvin maristojn, ludantaj kartojn sub brustvero⁷, kaj ŝipoficiron, kiu, rimarkinte min kiel scivoleman homon, kun plezuro montris al mi sian majstraĵon kaj ĉion, kio povas esti interesa por mi. Ĉi tiu oficiro tiel trankvile faris cigaredon, sidante sur kanono, tiel trankvile parolis kun mi, ke malgraŭ la kugloj, kiuj pli ofte ol antaŭe fajfis super mi, mi fariĝis pli trankvila, atente demandis kaj aŭskultis la rakontojn de la oficiro. Elstariĝante de malantaŭ la embrazuro⁸ por rigardi la malamikojn, mi vidis nenion kaj mi tre miris, kiam mi eksciis, ke la blanka ŝtona remparo, kiu estas tiel proksima al mi kaj sur kiu kelkfoje aperas blankaj fumetoj — tiu blanka remparo estas nome la malamiko — ”li”, kiel la soldatoj kaj maristoj diras.

La oficiro volis pafi iom en mia ĉeesto.

—Sendu bateriestron kaj servantojn al la kanono!

Kaj dek kvar maristoj lerte, ĝoje, iu enŝovante en poŝon pipon, iu finante maĉi sekiĝintan panon, frapante je la platformo per botoj, iris al la kanono kaj ŝargis ĝin.

Aŭdiĝis subite terurega fajfego de pafo: mi ekstremis per tuta korpo. Tuj poste aŭdiĝis fajfo de malproksimi-

7 teramaso por defendo kontraŭ malamikaj pafoj

8 aperturo por kanono

ĝanta kuglego — kaj densa pulva fumo kovris min kaj la moviĝantajn maristojn. Okaze de ĉi tiu pafado komenciĝis diversaj paroloj de la maristoj.

—Estis trafita la embrazuro mem.

—Jen "li" ekkoleros — tuj pafos ĉi tien, — diris unu el ili, kaj efektive baldaŭ post ĉi tio fajro kaj fumo unue montriĝis; la deĵoranto ekkris.

—Kanoono! kaj tuj post tio kuglego ekfajfis preter ni, batis en teron kaj disĵetis funele ĉirkaŭ si ŝprucojn kaj ŝtonojn.

La bateria komandanto koleriĝis pro ĉi tiu kuglego, ordonis ŝargi la duan kaj trian kanonojn; la malamiko ankaŭ komencis respondi al ni.

La deĵoranto denove kriis: "Kanono!" — kaj aŭdiĝis la sama bato, ŝutiĝis la samaj ŝprucoj. "Markelo!" — aŭdiĝis denove, kaj denove fajfado de bombo, ĉiam pli proksime; nigra globo batis en teron, poste disrompaĵoj disflugas kun fajfo, ŝtonoj bruas en la aero, kaj ĉiuj ŝprucmakuliĝas per koto. Jen denove deĵoranto kriis: "Markelo!" — ankoraŭ fajfado, bato, eksplodo de bombo, sed kune kun ĉi tio mi aŭdis ĝemon de homo. Mi iris al la vundito, kiu estas tute en sango kaj koto. Ĉe maristo parto de la brusto estas forŝirita. Oni levas lin, li hal-

tigas portilon kaj kun malfacileco, per tremanta voĉo, li diras al la kamaradoj:

—Pardonu, fratoj!

Samtempe kamarado-maristo venas al li, surmetas ĉapon sur la kapon, kiun la vundito substarigas al li, kaj revenas al sia kanono.

—Ĉiun tagon estas tiel — sep aŭ ok homoj, — diras al mi la oficiro.

Mi reiris al la urbo.

Laŭ la maro disportiĝas la sonoj de la regimenta orkestro sur la bulvardo, kaj kune aŭdiĝas ĉi tie la pafoj de la bastionoj.

Lev N. Tolstoj

Ĉapitro el "La sieĝo de Sebastopolo"

El la rusa tradukis A. Z.,

surbaze de pli frua traduko de N. Kabanov (1912)

Ĉe l'entombigo de l'povra Aleksandro

Kiam, la lastajn tagojn de Junio 1940, mi alvenis kun mia familio en Marseille, mi havis la ŝatindan avantaĝon, ke la loĝejproblemo por mi estis solvita.

Marseille estis tiuepoke superplena pro la konstanta alfluado de dekoj kaj dekoj da miloj, kiuj fuĝis antaŭ la invadanta ondego de l'germanaj armeoj. Vane la novaj alvenantoj serĉadis disponeblan loĝejon. Ili devis kontentiĝi per tre modestaj kuŝokazoj. La granda havenurbo ĉe la Mediteraneo estis alloga centro, al kiu celadis ne nur tiuj homoj, kiuj deziris lasi inter si kaj la malamiko distancon kiel eble plej longan, sed ankaŭ la eternaj pelitoj de l'migranta raso, kiuj esperis trovi tie ankoraŭ unu oportunecon por eskapi al Ameriko.

Ĉe mia alveno en Marseille mi sciis kien iri kaj kie loĝi. La Pariza entrepreno, al kiu mi apartenis, ricevis jam kelkajn monatojn antaŭe, kiel aliaj similspecaj institucioj, de la registaraj instancoj la konsilon zorgi ĝustatempe pri iu rifuĝejo por si kaj sia oficistaro, kie ajn en

malproksima provincurbo. Tiel, se iam la germanoj alvenus ĝis Parizo. . .

Tuj ĉe la unua kontakto la dometo rezervita por mia familio plaĉegis al ni. Modesta konstruaĵo nur teretaĝa, ĝi ricevis karesan ĉarmon de la sudlanda, eterne blua ĉielo kaj de ĝardeneto kun du afablaj platanoj kaj — kia ĝuo por ni, "norduloj"! — kun du palmarboj kaj multaj mimozuoj. Ĝi situis en periferia kvartalo, sude de la urbo, ĉe la marbordo. La tuta strato konsistis el samaj dometoj, ĉiuj konstruitaj laŭ unu stereotipa modelo: ligna kradbarilo, ĝardeneto, du platanoj, du palmoj, tri ĉambroj, unu kuirejo, unu ban-kamero, malantaŭa korto, fino.

Tiuj ĝemelaj domoj estis apartigitaj unu de la alia per brika mureto apenaŭ pli alta ol normalstatura viro. Kaj ĉar dum la tago la hejma vivado disvolviĝis sub la gastama ŝirmo de l'platanoj, kie la familioj kuniĝis ĉirkaŭ la manĝotablo, ni devis vole-nevole partopreni, almenaŭ pasive, la najbarajn konversaciojn, kiuj senescepte ŝajnis destinitaj por la eksporto, tiel laŭtaj ili estis. Kaj ĉar ne decis uzi niaflanke nur moderan flustrotonon dum ĉiuparte ĉirkaŭ ni, laŭ sudlanda maniero, ili traktis krioĉe kaj sen ia ĝeno eĉ intimajn priokupojn, — tiel ni eksciis tuj dekomence, ke la dekstra najbaro suferas pro hemoroidoj — ni devis altigi niajn voĉojn ĝis nekutimaj oktavoj nur por reciproki kvazaŭ-ĝentilaĵon kaj ne ludi

la rolon de konspirantoj inter tiuj bonaj homoj, kiuj konfide dismetis siajn kartojn, bildon supre, sur la tablon. Tiel oni baldaŭ rimarkis, ke ni estas Parizanoj, ĉar de la tiea prononcmaniero la nia diferencis kiel korvograkado de cikadĉirpado, ĉe kiu komparo la avantaĝo estas por Marseille.

Neniel mirige do, se la vekita scivolemo de l'najbaroj baldaŭ agitis siajn sondilojn en nia direkto. La unua, kiu enkondukiĝis ĉe ni, estis madame Nini. Ŝi okupis la dometon maldekstre de ni kaj kvankam ni ankoraŭ vidis neniun el ŝia familio, ni tamen havis la impreson, ke jam ni konas ĉiujn. Laŭ konversacipecoj disĵetitaj inter ili ni komprenis, ke madame Nini estas la mastrino, la nekontestbla ĉefo kaj centro. Iu Teo, afektmaniera, laŭ sia voĉo proksimume dudekjara, rolis kiel la filo, dum Nicole, nur knabineto, estis la nevino. Kaj Lina. Aŭdeble italdevena. Ŝi estis la servistino, kiu plenumis ĉiujn mastrumajn taskojn. Persono ne malhavebla. Ŝi permesis al si certan familiarecon kun la domestrino, kvankam ĉiuj ŝiaj diroj komenciĝis per respekttona "madame Nini", pro kio ankaŭ ni adoptis la formulon.

Tiun tagon, la unuan post nia alveno, iu ruĝa pilketo, pro misĵeto el najbara ĝardeno, ruliĝis sub niajn palmojn. Tuj ni resendis ĝin samvoje super la muron, al kiu gesto respondis transflanke "Dankon kaj ekskuzon!" — Kaj la sama voĉo, kun nuanco de milda skoldemo, daŭri-

gis, sed nun ne plu al nia adreso kvankam ankoraŭ por ni:

”Nicole, eta fadata, estu pli atentema dum viaj ludoj! Ne tedu la najbarojn!”

Post tio ni povis niaflanke nur balbuti ion pri ”nenia graveco!”

Unu kvaronhoron poste imponaspekta virino enpaŝis tra la kradopordo de nia ĝardeno. Ŝia vizaĝo, bone fle-gita sed iom ŝvela, disradiis multe da ĉarmo. Ŝi estis virtuozo pri la ridetarto. Dum ŝi ridetis, aperis sur ŝiaj van- goj kaj mentono tiuj ravaj kavetoj, pro kiuj famiĝis ĉiuj bubetkapaj anĝelbildoj. Ŝiaj trajtoj estis plaĉaj kaj krede- ble dankis tiun favoron al la ŝvebanta blondo de l’haroj. La haroj estis tinkturitaj, sed neniel provoke. Koncerne la aliajn korpopartojn madame Nini estis unu el tiuj abundaj personoj, kiajn la sudaj landoj produktas mal- aware kaj kiuj luktas vane, sensukcese, kontraŭ la disvas- tiĝo de l’propra kvanto. Tuj mi rimarkis, ke madame Nini ne plu luktas. Ŝia vulkana naturo jam de longe per- fortis ĉiujn korsetajn kaj similajn obstaklojn. Nur neder- landa dig-inĝeniero kapablus proponi al ŝi barilon rezis- topovan. Sed Nederlando estis tiuepoke okupita de la germanoj kaj nealirebla.

”Gesinjoroj”, ŝi salutis per ĝentila kapklino, ”mi venas senkulpiĝi pro la pilka incidento.”

”Sed, sinjorino, neniam estis incidento. Infanoj ja devas iel elspezi siajn fortojn. Ĉu vi bonvolas sidiĝi?”

Jen kiel ni konatiĝis kun madame Nini.

Komprenante, ke ni estas rifuĝintoj, ŝi tuj informiĝis, ĉu ni havas urgajn bezonojn? Ĉu ŝi povas esti utila? Ĉu ni scias, ke Marinette, en la farmo ”je duonhoro de ĉi tie” vendas ovojn je prezoj apenaŭ super tiuj de l’oficiala porciumado, kaj ke la fiŝisto revenas ĉiumatene je la sepa, kaj ke anstataŭ vicostari kun la aliaj virinoj, kiuj poste disputas inter si pro kelkaj sardeloj, oni povas venigi ”la maljunan piraton” en sian hejmon por pli trankvile marĉandi kun li; necesas nur iel sciigi al li, ke li havos bonan kafon kun brandeto. . .

Kiam madame Nini, tiu bonfarantino de l’homaro, forlasis nin, mia edzino konis ĉiujn utilajn adresojn en la tuta regiono kaj ilian uzmanieron.

Iom poste ankaŭ Lina sin prezentis. ”En la nomo de madame Nini” ŝi alportis duonlitron da lakto por la infanoj. Lina estis virino malalta, maljuneta, nigrahara kun ruĝa vizaĝo, kiu memorigis pri velkinta tomato. Ŝi parolis tre rapide, kun itala akcento. Ŝiaj okuloj estis viglaj, senhalte moviĝemaj, ĝenerale mallevitaj, sed oni sentis, ke ili vidas ĉion.

”Kaj se vi bezonas mian helpon”, ŝi proponis, ”voku min trans la muro.”

Kiaj afablaj najbaroj! Vere, ni estis bonŝancaj!

Pasis kelkaj tagoj. Niaj rilatoj kun madame Nini fariĝis pli kaj pli amikaj, pere de Lina, ĉar ŝin mem ni apenaŭ vidis. Matene oni interŝanĝis kelkajn komplimentojn, ĉiu siaflanke de l'mura ekrano. Posttagmeze, tre regule, ŝi tramveturis al la urbocentro, kie ŝi havis sian entreprenon aŭ, kiel diris Lina, "la aferon". Teo, la filo, estis ŝajne senokupa, ĉar li eliris el la domo nur por baniĝi en la proksima maro aŭ siesti sur la varma sablo.

* * *

Tiam okazis io.

Madame Nini revenis el la urbo jam antaŭ la vespero. Ŝi ne paŭzis en la ĝardeno. Ŝi ne respondis al la bonvenkrietoj de Nicole. Ŝi rapidis en la domon. Kuretantaj paŝoj sekvis ŝin. Kaj la pordo fermiĝis. De tiam super la ĝardeno de niaj maldekstraj najbaroj ŝvebis silento.

La postan tagon Lina venis ĉe ni kun okuloj ruĝaj pro multa plorado. Singultoj skuis ŝian magran bruston.

"Nu, Lina? Kio okazis?"

"La povra Aleksandro . . ." kaj el ŝiaj ofte interrompitaj paroloj ni komprenis, ke tiu Aleksandro estis la frato de madame Nini, kun kiu li prizorgis la aferon en la urbo. Kvardekjara li estis. Lina konas lin de ĉiam; ŝi estis lia mamnutristino. Bona viro, tiel noblakora, malavara kaj ĉio. Terure! Hieraŭ, ĉe la Vieux Port, li pasis preter iu grupo da kverelantaj viroj. Subite li vidis, ke unu el ili

manipulas revolveron. Kaj jen kuglo mispafita trafis la povran Aleksandron. Ĝi lokiĝis sub la koro. Tuŝproksime. Du horojn poste li mortis en la hospitalo. — Ne, oni ne retrovis la kverelintojn. Neniu konas ilin.

”. . . kaj madame Nini sciigas, ke la enterigo okazos morgaŭ je la 11-a. Oni kunvenos ĉe la preĝejo St-Victor.” Nova ploratako malhelpis la malfeliĉan Lina paroli plu.

Kondolence mi premis ŝian manon: ”Dankon pro la informo. Mi certe ĉeestos la enterigon.”

Lina ekrigardis, forviŝis la larmojn: ”Ĉu vi, sinjoro Eŝvarc, vi ĉeestos?” — Por elparoli mian nomon ŝi nepre bezonis apogpunkton kaj tial ŝi ĉiam antaŭmetis komencan vokalon.

”Jes,” mi klarigis, dezirante ekskuzi mian edzinon, ”je la 11-a mi povos liberiĝi de mia oficejo pli facile ol mia edzino de sia kuirejo kaj de la infanoj.”

Tiam mi rimarkis, ke ŝiaj nigraj okuloj ekbrilis kvazaŭ pro agrabla surpriziĝo.

”Mi diros al madame Nini, ke vi venos. Madame Nini estos tre kontenta!” Etpaŝe ŝi fortrotis sur kruroj tiel rapidmovaj sub la longa jupo, ke ŝi ŝajnis gliti.

Antaŭ la preĝejo kolektiĝis malmultaj personoj. Entute, krom mi, nur deko da virinoj. Kelkaj el ili ankoraŭ tre junaj; ĉiuj sobre vestitaj sed neniel indiferentaj.

Unue mi pensis, ke ili ne venis pro la funebraĵo kaj ke ili haltis tie, antaŭ la nigraj drapiraĵoj, arĝente borderi-

taj, de l'preĝejpordego, nur pro scivolemo. Sed baldaŭ mi rimarkis, ke ili parolas inter si duonvoĉe, retene, dum unu aŭ la alia ŝtele deviŝis unu larmon el la okuloj.

Kiam la funebra ĉaro alvenis, kiam malantaŭ la ĉerko preterpasis la impona maso de madame Nini kun alia, pli juna virino, cetere ambaŭ apenaŭ distingeblaj sub la longaj nigraj krepvualoj, la ĉeestantaro eksingultis tiel kortuŝe, ke ankaŭ mi devis uzi la poŝtukon. Rekonante min madame Nini tuj insistadis por ke mi aliĝu al ŝi, kvazaŭ mi estus membro de la familio, dum la aliaj sekvis je respekta distanco.

Dum la diservo konsternis min la subita konstato, ke inter la funebrantaro mi estas la sola viro! Ĉu do la povra Aleksandro ne havis amikojn, parencojn virajn? Aŭ ĉu pro la dummilitaj cirkonstancoj tiuj ĉi estis malhelpataj alveni ĝustatempe? Madame Nini sendube kaptis la mutan demandon de mia ekmirego. Ŝi flustris al mi: "Teo ne povis veni," kaj ankoraŭ pli mallaŭte, "lia situacio rilate al la armeo ne estas tre regula."

Oni reportis la ĉerkon sur la ĉaron, dum iu deĵoranta ceremoniestro invitis nin supreniri sur aŭtobussimilan veturilon intertempe alvenintan. Tiel ni sekvis la mortinton ĝis la tombejo. Unuavice malantaŭ la ŝoforo sidis madame Arlette, pri kiu, post rapida prezentado, mi sciis nur, ke ŝi estas la vidvino de l'povra Aleksandro. Apud ŝi sidis madame Nini kaj apud madame Nini

sidis mi. La kvara loko restis neokupita. Same neokupitaj restis du vicoj mallantaŭ ni. La sobre vestitaj virinoj grupiĝis funde de la aŭtobuso. El tiu memvola distanĉiĝo mi konjektis, ke ilia rilato al madame Nini estas tiu de laborprenantoj al sia ĉefo. Certe vendistinoj aŭ oficistinoj de l'entrepreno. Ili estis naŭ. Mi konkludis, ke la komerco de madame Nini en la centro de la urbo havas certan gravecon.

La tombejo estis malproksima. Survoje la pasantoj haltis, kompateme rigardis nin. La viroj demetis la ĉapelejn; la virinoj disĵetis rapide la kvar punktojn de l'krucoŝigno sur fronton, bruston kaj ŝultrojn. Madame Nini kaj la nova vidvino nenion diris. Ilia doloro katenis ilin. Vortoj, iam-tiam flustritaj malantaŭ mi, ne estis percepteblaj.

Fine ni haltis ĉe la tombejpordego. De tie ni paŝis procesie malantaŭ la ĉerko. Iel okazis, ke mi troviĝis inter madame Arlette kaj madame Nini. Ĉi lasta maltrankvile observis dekstren, observis maldekstren, kvazaŭ esperante trovi tie kelkajn kondolencantojn. Ŝi turnis sin al Arlette: "Estas neniuj!" — Arlette respondis nur: "Eble poste. . ." Sed madame Nini skuis la kapon: "Mi ne kredas."

La entombigo estis kortuŝa. Adiaŭa sceno kun disonancaj lamentoj, vekrioj, plendoj. Mi faris ĉion eblan por subteni la doloron de madame Nini. Ĝi estis peza. An-

kaŭ sinjorino Arlette sin apogis sur min. Helpserĉe mi okulsignis al la vendistinoj, kiuj komprenis. Servoprete ili enkroĉiĝis brak-sub-brake kun la du virinoj, milde fortrenante ilin de la tombo, kiun du fosistoj komencis jam plensuti. . .

Ĉiuj reokupis siajn sidilojn en la aŭtoĉaro, kiu tuj ek-ruliĝis laŭ indikoj de madame Nini. Por mi ŝi bonvolis klarigi: "Unue ni rekondukos la sinjorinojn al la afero; poste la veturilo iros ĝis la krucpunkto de l'Prado. Se tio konvenas al vi, profitu de la okazo. "

La afero de madame Nini troviĝis ĉe la strato Dumouriez. Kiam la aŭtoĉaro haltis, la naŭ neniel indiferentaj vendistinoj eliĝis, salutante nur per muta kapklino, kaj sen tempoperdo ili malaperis en unu el tiuj diskretaj domoj, kiuj anstataŭ firmoŝildon portas nur dikan numeron. Timante, ke mi tro bone komprenas, mi palpebrumis plurfoje, klarigbezone, kiel iu, kiu abrupte vekiĝas en medion nekonatan.

Samvespere, reveninte en mia hejmo, mia edzino raportis:

"Ĉi posttagmeze, dum mi atendadis mian vicon ĉe la spicisto, mi aŭdis edifajn aferojn pri tiu Aleksandro. Ĉu vi scias, kien vi enmetis la piedojn ?

"Mi timas, ke mi scias."

"Li estis bandestro, specialisto de kontrabando kaj ĉiaj eksterleĝaj trafikoj, inkluzive de virinnegoco. Rivaloj,

kiujn li trompis, faligis lin. Cetere ĉio tio, kiel ili diris, aperis larĝkolone en ĉiuj ĵurnaloj. Kompreneble vi, fervora ĵurnalleganto, nenion vidis!”

”La loka klaĉo ne interesas min. Al mi sufiĉegas la militaj eventoj!”

Tamen mi iris tuj por preni sur mia noktobleno la antaŭtagan numeron de la ”Petit Marseillais”. Dum mi legadis la koncernan artikolon — ĝi konfirmis, kion mi jam sciis — madame Nini aperis sur la sojlo de la ĉambro.

”Mi venas danki vin, sinjoro,” kaj super min ŝi elŝutis sennombrajn komplimentojn pri ĝentileco kaj laŭdovortojn pri belega konduto, ”kiu hontigos la virojn de Marseille, ĉar vi sola ” — ŝi daŭrigis nebremseble ”montris, ke ankoraŭ ekzistas viroj por defii fanfaronadon!”

Ĉio tio ŝajnis al mi nebulaĵo kaj mi pensis, ke madame Nini fantazie troigas, kiel ili ofte faras en tiu sunbenita lando. Refoje ŝi deklamis: ”Dankon! dankon!” kaj kun sia afabla, kutima kapklino, kun sia rideto, al kiu hodiaŭ ombreto da malĝojo pruntedonis nedifineblan pluan ĉarmon, madame Nini retiriĝis. Ni ne provis ŝin reteni.

Tuj mi reprenis la ĵurnalon por finlegi la nekrologon pri Aleksandro Durati.

”. . . kaj konforme al la neskribitaj leĝoj de tiu aparta medio la viktimo rifuzadis ĝis la fino konigi la nomon

de sia murdinto. Lia enterigo okazos morgaŭ. Sendube nur virinoj akompanos lin al lia lasta restejo, ĉar la rivala bando avertis tra la tuta urbo, de la Joliette ĝis la Madrague de Montredon: Neniu viro ĉe la entombigo de Durati, — li ne revenus vivanta!”

Raymond Schwartz

Ĉu ekzistas anĝeloj? (5)

Amikeco

Plej supre en la bankpalaco Jan malkovris fenestron, kiu estis preskaŭ turnita al la maro. Se li streĉis la kolon kaj turnis la kapon je 45 gradoj, li povis vidi la eniron en la havenon; ĝi aspektis kiel larĝa rivero, kiu larĝiĝis al vasta horizonto. La haveneniron iom kaŝis kamentuboj kaj mastoj, sed pli fore ĝentila mano forviŝis la malglataĵojn, kaj vico da insuloj sin levis kiel mamoj. Li konis ilin ĉiujn. Li vidis la ĉielon super ili kaj revis eksteren.

Sed la pozicio estis malkonforta. Ankoraŭ du sekundojn kaj li ne povus returni la kapon sen kuracista helpo.

Li retiris ĝin, rektigis ĝin kaj rigardis ĉirkaŭen,

La banko havis multajn okulojn, kaj ofte oni trovis paron da ili en sia proksimeco. Sed li estis sola. El la brustopoŝo li elteris papereton, talismanon.

Ne senkuraĝiĝu.

Li vespiris, ĵetis finan rigardon tra la fenestro kaj pluiris.

Grandaj homoj havas momentojn da dubado kaj malforteco. Kial do malgranda homo ne dividu la sorton?

Li havis ĉiukaze du amikojn en la banko: Hagson kaj Margareta. Kun du amikoj oni povas veni kiom ajn longen. Pli multajn oni ne bezonas en la vivo.

Ili sciis, kiu li estas. Baldaŭ la tuta banko scios tion.

Rilate al la konatiĝo kun Margareta, estis tiel, ke ŝi kromlaboris la antaŭan posttagmezon. Ŝi laboris je kontraktoj, laŭ ĉies opinio la plej teda laboro en la banko.

Donita al la plej bela junulino de la banko, laŭ la principo taŭga persono sur taŭga posteno.

La suno brilis kaj ŝi estis elegante vestita. Ŝi suspiris kaj rigardis la horloĝon fojon post fojo, jen io, jen alio. Io mansvingis kaj atendis: insuloj, maro, suno, eble danco planko.

Unu el al kartaroj, tiu per kiu ŝi laboris, estis tiritita tro longe eksteren. Milimetra ŝanĝo de la pezpunkto, nur malgranda tuŝo, kaj ĝi falos sur la plankon.

Jan aranĝis tiun tuŝon, kiam li preterpasis. La efiko estis terura en tiu malplena lokalo: sonis kiel se bombo estus ĵetita. Fraŭlino Günter saltis alten en la aeron, ridis unue histerie, poste ekploris.

—La tirkesto Johansson, ŝi plorsingultis, la plej terura el ĉiuj!

—Ĉu ekzistas tiom da ili? Jan diris. Estis malfacile diri, ĉu kuŝas 400 aŭ 4000 kartoĵoj sur la planko. Bela amaso estis. Kiel unua li retrovis la aplombon.

—Estis mia eraro! li diris kaj komencis kolekti.

—Ne, estis mia, ŝi asertis kaj sekigis siajn okulojn. Kaj mi estis ĵus preta. Mi devus nur . . .

—Mi prizorgos la kartoĵojn, li diris. Vi iru!

Ŝi ĉesis aspekti malĝoja, rigardis lin kaj liajn vestaĵojn, diris:

—Tre koran dankon, mia nomo estas fraŭlino Günter.

—Froman, Jan diris.

—Ĉu Froman? Kiu sekcio?

—La pedela sekcio.

—Mi estos eterne dankema al vi, ŝi diris. Se mi povos helpi vin alifoje, mi volonte faros tion.

Ekzemple, li pensis, per stenciloj, portado de mesaĝoj aŭ tajpiloj. Sed ŝiaj vortoj estis serioze celitaj, kaj oni neniam povas scii.

Ŝi surhavis bluzon kaj jupon, arĝentan zonskarpon ĉirkaŭ la talio kaj pezan arĝentan braceleton ĉirkaŭ la brako. Kiam ŝi streĉis antaŭen sian dekstran manon, li vidis zipon je la dekstra flanko de la bluzo. Li fiksrigardis ĝin fascine. Li volis tiri ĝin. Estis perversa, nebridebla postulo, li neniam sentis ion similan.

Li englutis kaj englutis.

—Mi volonte faros tion por vi, li fine diris.

Ŝi ridetis, redankis varme kaj eterne, kunplukis siajn objektojn kaj iris. Li rigardis longe post ŝi, pensis pri ŝia bluzo kaj surgenuiĝis.

Baldaŭ poste Hanson venis survoje eksteren.

—Kion vi kunbraĝis! li diris. Ĉu vi trovis mirtelojn?

—Helpu kolekti anstataŭe, Jan diris mallonge. Mi ne petis tion ĉi.

Hanson rigardis de la disigitaj kartoj al la kontrakto-pulpeto kaj reen.

—Jes ja, li diris fine, mi helpos vin. Eble estas mia vivoŝanco esti invitita al altsocieta geedziĝo.

Estis peza laboro ordigi ĉiujn Johansson de la urbo. Estis pli multaj ol atendite, kaj ili ambaŭ fariĝis malsataj.

—Sekvu min hejmen al vespermanĝo, Jan diris. Mi estas sperta manĝofaranto!

Jan loĝis plej alte sur la roko, kiu nomiĝas Granda Karlo, kaj estis nur dek, dek du minuta promeno tien. Hagson loĝis fore ĉe la urbolimo.

—Devas esti agrable eviti kunpuŝiĝi sur aŭtobusoj kaj tramoj, li rimarkigis. Mi ne havas tiajn avantaĝojn! Ĉiamaj kvereloj! Li estis spertega en aranĝado de sidloko al si per pugnoj kaj kubutoj kaj povis prave plendi, ke ĉiam estis kvereloj, kiam li veturas al kaj de la laborejo.

—Aŭtobusoj kaj tramoj estas malbeno de la civilizo, li aldonis, ĉar li opiniis, ke li devas diri ion.

Li eble devus esti atendinta iom.

Veni al la bastiono Granda Karlo estis kiel grimpi sur monton. Hagson baldaŭ perdis la spiron. Ne estus maltaŭge kun aŭtobuso, sed ĉar nek aŭtobusoj nek tramoj estas konstruitaj por montogrimpado, li devis kontentiĝi per sia propra kapablo. Sed en silento li malbenis la tramkompanion.

Jan iris laŭ la kvieta trotado, kiun Hagson rekonis el la banko. Estis fakte rapida trotado, li devis duonkuri por ne postresti.

La kurbiĝantaj stratoj kuŝis silentaj kaj senhomaj. Escepte de unu aŭ alia laktejeto, kiu estis sen klientoj depost la deka matene, ne ekzistis butikoj ĉi tie. Oni devus havi laktejon en ĉi tiu parto, Hagson pensis por si mem.

Jan loĝis, kiel dirite, plej supre sur la roko en kvin-etaĝa domo. Finfine ili estis tie. La vestiblo estis mallargâ, malvarmeta kaj alta.

—Kioma etaĝo? Hagson demandis sensuspekte.

—Plej alte, bonŝance, Jan diris gaje. Nur kvara!

Hagson ĵetis senesperan rigardon ĉirkaŭen. Ŝtuparoj estis lia timego, estis ofickomplekso.

—Ĉu ne ekzistas lifto? li demandis.

—Lifto, ne! Neniu el la malbenoj de civilizo ekzistas en ĉi tiu urboparto!

Ĉu estis dirite intence aŭ ne, estis forte, kaj Hagson sentis sin nokaŭtita. Necesis diri ion, ion alian. Li kaptis la tenilon, silente elspiris kaj diris malkuraĝe:

—Kiam mia Hulda iras al la manĝobutiko, ŝi kutimas forgesi duonon. Mi miras, ĉu helpus loĝi tiamaniere.

Iom post iom ili atingis la celon. Tra la ŝtupara fenestro ili vidis ruĝan ladan tegmenton, kelkajn malplenajn subtegmentejajn fenestrojn — kiel se dentisto estus amokinta sur la tegmento — dekon da fantomecaj fumtuboj kaj nenombreblan kvanton da radioantenoj. Ne indis reparoli pri civilizo, tial Hagson silentis.

—Ne speciale alloga elrigardo, Jan prezentis. Ĝi estas egala el niaj fenestroj. La bono kun ĝi estas, ke ĝi igas nin sopiri eksteren al la maro.

Sur ĉiu etaĝo Hagson nombris du loĝejojn. Same plej alte. Li rigardis la pordoŝildojn. Sur ambaŭ li legis

FROMAN

—Tie panjo loĝas, Jan klarigis, kaj ĉi tie mi.

—Ĉu vi loĝas sola? Hagson demandis surprizite, ĉar pri manko de loĝejoj oni parolis eĉ dum drinkado.

—Jes, Jan diris, kompreneble. Estas la domo de panjo. Ŝi posedas ĝin kune kun iu ŝparbanko. Eniru!

Regis komplete silento en la loĝejo, kiu laŭ mebligo kaj aranĝo estis samaĝa kun la tempo de la praavoj. Ĝi estis malhela, la iam blanka plafono havis koloron, kiu elvokis la esprimon "fumita firsto". La ĉambroj, entute kvar, estis kaj longaj kaj larĝaj kaj altaj, kaj kun kahelaj fornoj. En la kuirejo estis lignaĵkesto kaj lignoforno kun fajrohoko kaj kupra akvujo, kiu vekis malklarajn memorojn ĉe Hagson, ion pri pumpilo, bataloj kaj somerkolonio. Sur la kuirforno staris bela brila primuso. La rigardo al ĝi estis konsolo al Hagson, kiu kredis, ke tiu, kiu devas prepari manĝon sur brulforno, devas ellitiĝi je la kvara matene kaj fari fajron, por ke estu varme ĝis la vespero. Kupraj kaseroloj plenigis la bretojn kaj ŝrankoj la murojn.

Jan prezentis la ĉambrojn sinsekve kiel hobioĉambro, biblioteko, dormoĉambro kaj manĝoĉambro. La prezentado ne estis nenecesa, ĉar la ĉambroj similis unu la alian kiel kvar predikoj. Libroj kuŝis ĉie, tio, kio eventuale estis lito, aspektis kiel enkonstruita ŝranko en la manĝoĉambro, la dormoĉambro estis plena da ŝraŭboj, ŝraŭbingoj, magnetoj, radiotuboj, fadenoj kaj ĉiaspecaj iloj.

—Ĉu tio estas la radio, kiun vi riparadas?

Jan aspektis ĝene tuŝita.

—Mi laboris per ĝi dum tri jaroj, li agnoskis, kaj mi promesis al mi mem, ke mi rekonstruos ĝin. Ĉiuj pecoj estas tie.

—Li diris tion, la kofromurdisto, kiam li petis pri indulgo, Hagson rimarkigis seke.

La libroj imponis al li, ĉar li mem nenion legis, sed li esprimis sian plej grandan admiron pri la gramofonarkivo. Jan havis amason da diskoj kaj belan radiogramofonon.

—Ĉu ĝi funkcias? li demandis zorgeme.

Jan respondis jese, sed aldonis, ke li havas ankoraŭ pli belan arkivon en la kuireja vestiblo.

Kio tio povus esti? Hagson miris. Li povis baldaŭ vidi. Ekster la kuirejo estis longa mallarĝa pasejo, kiu ŝajnis finiĝi ie, eble en la loĝejo de la patrino. Je ambaŭ flankoj de la pasejo estis ŝrankoj, kiuj streĉis sin de la planko ĝis la plafono. Sur la ŝrankoj estis pentritaj la jenaj ĉefrubrikoj.

SURMETAĴOJ
VIANDAĴOJ
FIŜAĴOJ
SUPOJ
DESERTOJ

La ŝrankoj enhavis konservojn, estis tie miloj da skatoloj. Hagson estis mutigita: li neniam aŭdis pri konservarkivo.

—Ni estas tiel praktikaj, panjo kaj mi, ĉu vi ne opinias? Jan demandis kaj ŝajnis atendi laŭdon. Hagson nur kapjesis.

—Ni pagis grosistan prezon por ili, Jan aldonis, panjo havas fruktobutikon. Kion vi deziras por vespermanĝo?

Sed Hagson estis daŭre muta.

—Elektu mem! li fine elbuŝigis.

Per mansvingo Jan prenis suben tri, kvar skatolojn kaj Hagson komprenis, kion li celis, kiam li diris, ke li estas sperta je manĝofarado. Ĉar li ne kredis, ke ekkzistas tia fenomenaj lerteco malfermi konservkatolojn. Neniu blasfemo, neniu erara aŭ hezita manmovo, sssssss, nur aŭdiĝis, kaj tie kuŝis la kovrilo bele elsegita.

La primuso ekflamis kaj la manĝo estis preta, antaŭ ol Hagson sufiĉe rekaptis sin por ricevi la venontan ŝokon.

Se ekzistas io, kion li malŝatis, tio estas fiŝobuloj. Kial Jan servu ĝuste tion? Se estas io, kion li ne aprezis, tio estas fungoj. Kun la fiŝobuloj Jan servis fungosaŭcon, saŭcon, kiu je naŭ dekonoj konsistis el fungoj. Freŝajn terpomojn li aprezis, tio estis konsolo, sed ne tiajn, kiuj venas el konservskatolo.

Brandon kaj bieron li ankaŭ aprezis, sed tion li ne ricevis. Li devus esti supozinta tion.

Li manĝis silenta kun muelanta makzelo kaj ĉirkaŭira rigardo.

—Kie en ĉi tiu loĝejo vi intencas lokigi Margaretan Günter? li diris duonvoĉe, kiam li englutis la unuan bulon.

Jan skuis senzorge la ŝultrojn.

—Ĉi tie estas loko por ankoraŭ unu!

—Tiam estus sur la planko en la angulo dekstre de la fenestro en la hobia ĉambo, Hagson diris kaj ekatakis la duan bulon kun sento de maratonulo, kiu post tridek kilometroj rimarkas, ke li perdiĝis.

Li estis maljusta, kiam li atakis la estontan feliĉon de Jan pro kompatinda fiŝobulo, sed ĝuste tiam li ne povis regi sin.

—Kion vi deziras kiel deserton? Jan demandis.

—Malfermu skatolon! Hagson diris malgaje.

Dirite farite, Jan revenis kun malfermita konservskatolo, du kuleroj, du teleroj kaj du glasoj, kiuj aspektis kiel vinglasoj. Terura suspekto vekiĝis en Hagson, kiu faris movon kiel se li volus fuĝi, sed refalis senvorte sur la seĝon. Okazis la plej terura. Jan venis kun botelo, kiu ne havis la kutiman botelĉapeton aŭ koloron.

Hagson rajtis je tri litroj da brando ĉiumonate, kiujn li aŭ iu alia konscienceme eltrinkis kun aŭ sen biero.

Vinon li neniam trinkis; tio estis io, kion eventuale oni povis gustumi dum entombigoj, kiam maltaŭgis englution, kio celis igi la homon gaja kaj forgesigi malgajon kaj zorgojn. Li povis neniam imagi, ke estos vino kun la manĝo.

Sed je la nomo de dio. Se li jam manĝis du fiŝobulojn

...

—Haltu, li kriis, ne pli! sed estis tro malfrue, la glaso jam estis plena. Li rigardis la botelon, io stranga estis skribita sur ĝi, kion li ne aŭdis pli frue, Ajö aŭ Ujo aŭ io tia. Li ekpensis pri skalpigo aŭ alia simila vorto.

La konservskatolo enhavis pirojn kaj tio aspektis pli homa. Li prenis du duonojn. Jan levis sian glason.

—Tosto por la estonteco! li diris. Kaj por Margareta Günter!

—Sanon! Hagson ekĝemis. Li levis la glason inter la montrofigro kaj dikfigro kaj rigardis kritike la nekonatan trinkaĵon. Du aferojn vi mafidu, li daŭrigis. Ĉarmajn knabinojn kaj malmultekostajn vekhorloĝojn! Tosto por Margareta Günter!

Li englutis guton, bruligis iom sur la lango. La brulseno sekvis kun la trinkaĵo suben ĝis la ventro, kie ĝi haltis je iu punkto. Li prenis pluan gluton, ĉar tamen brulis. Sed ne bruligis ĉifoje, anstataŭe estis plaĉa, jes, agrabla varmo, kiu fluis en la korpon. Li enverŝis la tutan

enhavon de la glaso. Neniam antaŭe sentita sento pri feliĉo kaptis lin. En rapida sinsekvo li eltrinkis ankoraŭ kelkajn glasojn de la sendanĝera trinkaĵo.

De tio, kio poste okazis, li ne multon memoris.

La feliĉosento, kiu sekvis la vinon, fluis en la langon, kiu komencis fari cirkosaltojn kaj saltomortalojn en neniam malkreskanta fluo. Ne eblis haltigi la movojn de la lango. Kaj kial li faru tion? La eta organo vivis sian propran ebriigan ĝojovivon. Ĝi parolis — ne Hagson — parolis, parolis. Pri la banko, pri Marcus, pri Stenman, pri Westin. Pri tio, kiel oni traktas la eksterlandajn klientojn, kiel okazas, kiam iu Hagson promocias kontoristojn. ("Vi vidos, kiam ajn Huss fariĝos estro por dek ses, ĉu vi kredos min tiam?") Ĝi rakontis al Jan pri la vivo, ĝi promesis al li direktoran postenon, kion ajn li volis, eĉ Margaretan Günter. Nenio estis malebla.

Kaj tio tamen estis nur tio, kion Hagson malklare memoris. Li certe diris multon pli, sed pri tio la kurteno restis senkompate subentirita. Neniam li estis tiel feliĉa, tiel eŭforia, tiel babilema.

Kiel li venis hejmen, restis por ĉiam nekonate al li. Li havis malklaran memoron, ke Jan donis saketon en lian manon kaj ke rozkolora nubojn alglitis super la tegmentoj kaj haltis ekster la fenestro de Jan, Hagson suriris ĝin kaj estis portita hejmen. Kiel en fabelo! Kiam li vekiĝis

en sia lito la postan matenon, vestita en piĵama jako kaj bankalsono, li tenis daŭre firme la saketon en sia mano.

Lia rigardo falis unue sur ĝin. Li longe fiksrigardis ĝin, elspiris suspiron de bonfarto kaj klopodis memori, kion ĝi enhavas. Ion valoran, ion belan, ion multekostan.

Jan estis infaneca honestulo, kiu bezonas kontrolon en la vivo. Li ricevos tion!

Hagson malfermis atenteme la saketon.

Ĝi enhavis nekredeblan kvanton da rompitaĵoj kaj malplenan vinbotelon.

Li ridis beate. Jes, estis mirinda vespero.

John Einar Åberg

Kvina ĉapitro el samtitola romano

El la sveda tradukis Franko Luin

La maskofesto de Ruĝa morto

Ruĝa morto jam de longe dezertigis la landon. Neniu pesto iam antaŭe estis tiel mortiga, aŭ tiel abomeninda. Sango estis ĝia Avataro kaj ĝia sigelo — la ruĝo kaj teruro de sango. Estis akraj doloroj, kaj subita kapturniĝo, kaj poste abunda sangado el la poroj, kun mortiĝo. La skarlataj makuloj sur la korpo kaj precipe sur la vizaĝo de la viktimo, estis la pest-interdikto, kiu lin forbaris de helpo kaj simpatio de liaj kunhomoj. Kaj la tuta atako, progreso, kaj finiĝo de la malsano okazis en duonhoro.

Sed princo Prospero estis feliĉa kaj sentima kaj sagaca. Kiam lia regno estis duone senhomigita, li vokis al si milon da sanaj kaj gajaj amikoj el inter la gekavaliroj de sia kortego, kaj kun tiuj foriris en la profundan apartecon de unu el siaj kastelecaj abatejoj. Tio estis vasta kaj grandioza konstruaĵo, kreaĵo de la ekscentra sed majesta gusto de la princo mem. Fortika kaj alta muro ĝin enzonis. La muro havis pordojn el fero. Enirinte, la korte-

ganoj alportis fornojn kaj masivajn martelojn, kaj kunforĝis la riglilojn. Ili decidis lasi neniun rimedon por eniro aŭ eliro pro subitaj impulsoj de malespero aŭ de frenezo interne. La abatejo estis abunde provizita per nutraĵoj. Per tiuj antaŭzorgoj ili povus spiti la kontaĝon. La ekstera mondo prizorgu sin mem. Dume, malsaĝe estas bedaŭri aŭ pripensi. La princo estis provizinta ĉiujn rimedojn por plezuro. Estis histrionoj, improvizistoj, baletistinoj, muzikistoj; estis beleco, estis vino. Ĉio ĉi kaj sendanĝereco estis interne. Ekstere estis la Ruĝa morto.

Estis ĉirkaŭ la fino de la kvina aŭ sesa monato de sia apartiĝo, kaj dum la pesto plej ege furiozis ekstere, kiam princo Prospero regalis siajn mil amikojn per maskbalo plej nekutime grandioza.

Ĝi estis volupta spektaklo, tiu maskofesto. Sed unue mi rakontu pri la ĉambroj, en kiuj ĝi okazis. Estis sep — imperiestra ĉambraro. En multaj palacoj, tamen, tiaj ĉambraroj formas longan kaj rektan perspektivon, kaj la faldeblaj pordoj glitas malantaŭen preskaŭ ĝis la muroj je ĉiu flanko, tiel ke la vido tra la tuta etendo apenaŭ estas obstrukcata. Tie ĉi la aferoj estis tre malsimilaj, kiel oni eble atendus pro la princa amo al strangeco. La ĉambroj estis tiel malrekte aranĝitaj, ke la vido ampleksis malmulton krom unu samtempe. Troviĝis akuta kurbo je ĉiu dudeko aŭ trideko da jardoj, kaj je ĉiu kurbo nova

efekto. Dekstre kaj maldekstre, meze de ĉiu muro, alta kaj mallarĝa ogiva fenestro elrigardis sur fermitan koridoron, kiu sekvis la serpentadon de la ĉambraro. Tiuj ĉi fenestroj estis el kolorita vitro, kies koloro variis laŭ la ĝenerala nuanco de la dekoracio de la ĉambro, en kiun ĝi malfermiĝis. La ĉambro ĉe la orienta fino, ekzemple, estis tapetita blue — kaj brilege bluaj estis ĝiaj fenestroj. La dua ĉambro estis purpura en ornamo kaj tapeto, kaj tie ĉi la vitroj estis purpuraj. La tria estis tratute verda, kaj tiaj estis la fenestroj. La kvara estis meblita kaj lumigita oranĝkolora — la kvina blanke — la sesa viole. La sepa ĉambro estis ĉirkaŭ-vualita per nigraj veluraj tape-
taĵoj kiuj kovris la plafonon kaj murojn, falante en pezaj faldoj sur tapiŝon el sama ŝtofo kaj koloro. Sed, nur en ĉi tiu ĉambro, la koloro de la fenestroj ne respondis al la dekoracio. La vitro ĉi tie estis skarлата — malpale sangkolora. Nu, nenie en la sep ĉambroj troviĝis lampo aŭ kandelabro, inter la amaso da oraj ornamaĵoj, kiuj kuŝis dise metitaj aŭ pendis de la plafono. Neniu lumu venis el lampo aŭ kandelo en la tuta ĉambraro. Sed en la koridoroj, kiuj laŭiris la ĉambraron, staris kontraŭ ĉiu fenestro peza tripiedo, portanta brulantan fajrokorbon, kiu sendis siajn radiojn tra la kolora vitro kaj tiel brilege iluminis la ĉambron. Kaj per tio produktiĝis multege da brilkoloraj kaj fantaziaj aperaĵoj. Sed en la okcidenta aŭ

nigra ĉambro la efekto de la fajrolumo, kiu fluis sur la malhelajn tapetaĵojn tra la sangnuanca vitro, estis ekstreme terura, kaj kaŭzis tiel sovaĝan aspekton en la vizaĝoj de la enirintoj, ke malmultaj el la kunvenintoj estis suface kuraĝaj por iam meti la piedojn internen.

En ĉi tiu ĉambro, staris ankaŭ apud la okcidenta muro giganta horloĝo el ebono. Ĝia pendolo svingiĝis tien kaj reen kun obtuza, peza, monotona sono; kaj kiam la minutmontrilo finis la ĉirkaŭiron de la ciferplato kaj la horo estis sonorigota, venis el la latunaj pulmoj de la horloĝo sono, kiu estis klara kaj laŭta kaj profunda kaj treege muzika, sed tiel stranga en noto kaj emfazo ke, je ĉiu forpaso de horo, la muzikistoj de la orkestro estis devigataj paŭzi, momente, en sia ludado por aŭskulti la sonon; kaj sekve la valsantoj devige ĉesis turniĝadi; kaj okazis mallonga konfuziĝo tra la tuta gaja aro; kaj, dum la horloĝa sonorado ankoraŭ daŭris, oni rimarkis, ke la plej frivolaj paliĝis, kaj la pli aĝaj kaj seriozaj pasigis la manojn trans la frunton kvazaŭ en konfuza revo aŭ meditado. Sed kiam la ĉeĥoj plene ĉesis, facila ridado tuj trafis la ĉeestantaron; la muzikistoj rigardis unu la alian kaj ridetis kvazaŭ je sia propra timo kaj malsaĝeco, kaj flustre ĵuris, reciproke, ke la venonta sonorado de la horloĝo kaŭzos en ili neniun similan emocion; kaj tiam, post forpaso de sesdek minutoj (kiuj ampleksas tri mil

kaj ses cent sekundojn el la tempo, kiu forflugas), venis ankoraŭ plua sonorado de la horloĝo, kaj tiam okazis la sama konfuziĝo kaj tremado kaj meditado kiel antaŭe.

Sed malgraŭ tiuj aferoj, estis gaja kaj belega festo. La gustoj de la duko estis strangaj. Li posedis bonan okulon por koloroj kaj efektoj. Li ignoris la nure laŭmodajn dekoraciojn. Liaj planoj estis kuraĝaj kaj fajrecaj, kaj liaj konceptoj ardis per barbara brilo. Estas personoj, kiuj kredus lin freneza. Liaj sekvantoj sentis, ke ne. Estis necese lin aŭdi kaj vidi kaj tuŝi por *certiĝi* ke ne.

Li estis direktinta, grandparte, la moveblajn beligaĵojn de la sep ĉambroj, je la okazo de tiu ĉi granda festo; kaj estis lia gvidanta gusto, kiu karakterizis la festulojn. Estu certa, ke ili aspektis groteskaj. Estis multe da parado kaj brilo kaj pikanteco kaj fantazio — multe da tio, kio poste vidiĝis en *Hernani*. Estis arabeskaj figuroj kun netaŭgaj membroj kaj ornamaĵoj. Estis deliraj imagaĵoj, kiajn faras frenezulo. Estis multe da belo, multe da vanto, multe da strango, iom da teruro, kaj ne malmulte da tio, kio povus krei naŭzon. Tien kaj reen en la sep ĉambroj pasis, efektive, arego da songoj. Kaj tiuj ĉi — la songoj — intertordiĝis, kaptante koloron de la ĉambroj, kaj igante la sovaĝan muzikon de la orkestro ŝajni kvazaŭ eĥo de iliaj paŝoj. Kaj poste, jen sonoras la ebena horloĝo, kiu staras en la halo de la veluro. Kaj tiam, momente, ĉio

ĉesas, kaj ĉio silentas krom la voĉo de la horloĝo. La sonĝoj rigidiĝas, kie ili staras. Sed la eĥoj de la sonorizado formortas — ili daŭris nur momenton — kaj facila, duonsubigita rido flote sekvas ilin, dum ili forpasas. Kaj nun denove la muziko sonas, kaj la sonĝoj vivas kaj tor-diĝas tien kaj reen pli gaje ol iam, prenante koloron el la multnuancaj fenestroj, tra kiuj fluas la radioj el la tripe-doĵ. Sed en la ĉambrom, kiu kuŝas plej okcidente el la sep, neniu maskulo nun kuraĝas iri; ĉar la nokto forvelkas; kaj fluas pli ruĝa lumo tra la sangkoloraj vitroj; kaj la nigreco de la malpalaj drapiraĵoj konsternas; kaj al tiu, kies piedo surpaŝas la nigran tapiŝon, venas el la apuda ebena horloĝo obtuza sonoro pli solene emfaza ol iu ajn, kiu atingas la orelojn de tiuj, kiuj partoprenas la pli forrajn gajaĵojn de la aliaj ĉambroj.

Sed tiuj aliaj ĉambroj estis dense plenigitaj, kaj en ili febre batis la koro de vivo. Kaj la festado kirliĝe daŭris, ĝis fine eksonoris meznokto ĉe la horloĝo. Kaj tiam la muziko ĉesis, kiel mi rakontis; kaj la turniĝado de la valsantoj trankviliĝis; kaj estis ĝena ĉesiĝo de ĉio kiel antaŭe. Sed nun dek du batoj estis sonorigitaj de la horloĝo; kaj sekve okazis, eble, ke pli da penso eniĝis, kun pli da tempo, en la meditojn de la pensemaj inter la festantoj. Kaj sekve ankaŭ okazis, eble, ke antaŭ ol la lastaj eĥoj de la lasta sonoro tute silentiĝis, multaj perso-

noj en la amaso trovis tempon por percepti la ĉeeston de maskita figuro, kiu ĝis tiam ne kaptis la atenton de iu ajn. Kaj kiam la famo pri tiu ĉi nova ĉeesto flustre ĉirkaŭvastiĝis, leviĝis el la tuta festantaro zumo, aŭ murmuro, esprimanta malaprobbon kaj surprizon — tiam, fine, teruron, abomenon, kaj naŭzon.

En kunveno de fantaziaĵoj, tia kian mi skizis, oni povus facile supozi, ke neniu ordinara aperaĵo estigus tian sensacion. Vere la vestaĵa liberegeco de la nokto estis preskaŭ senlima; sed la koncerna figuro superkonkuris ĉiujn, kaj transiris la limojn eĉ de la sendifina konvenemo de la princo. Estas kordoj en la koro de la plej malprudenta, kiuj ne povas esti tuŝataj sen emocio. Eĉ ĉe la plenperdiĝintaj, por kiuj vivo kaj morto estas egale ŝercoj, ekzistas aferoj, pri kiuj oni ne povas ŝerci. Fakte, la tuta amaso nun ŝajnis senti profunde, ke en la kostumo kaj mieno de la fremdulo estas nek sprito nek deco. La figuro estis alta kaj maldikega kaj vualita de kapo ĝis piedoj en vestaĵoj de tombo. La masko, kiu kaŝis la vizaĝon, estis tiel preskaŭe similigita al vizaĝo de rigidiĝinta kadavro, ke la plej detala ekzameno nur malfacile eltrovus la trompon. Kaj tamen ĉio ĉi eble estus tolerita, se ne aprobita, de la frenezaj festantoj ĉirkaŭe. Sed la maskulo permesis al si alpreni la tipon de Ruĝa morto. Lia vestaĵo estis ŝmirita de sango — kaj lia larĝa

frunto, kun la tuta trajtaro de la vizaĝo, estis aspergita de la skarлата abomenaĵo.

Kiam la okuloj de princo Prospero ekvidis tiun fantoman figuron (kiu, per malrapida kaj gravmiena movo, kvazaŭ por pli plene subteni sian rolon, paŝis tien kaj reen inter la valsantoj) oni rimarkis, ke li konvulsiigis en la unua momento per forta tremego de teruro aŭ de malŝato; sed tuj poste lia frunto ruĝigis pro kolerego.

”Kiu kuraĝas,” — li raŭke demandis al la korteganoj, kiuj staris apude — ”kiu kuraĝas insulti nin per tiu ĉi blafema moko? Kaptu kaj senmaskigu lin — por ke ni sciu, kiun ni devos pendigi, je sunleviĝo, de la kreneloj!”

En la orienta aŭ blua ĉambro staris princo Prospero, kiam li diris tiujn vortojn. Ili sonoris tra la sep ĉambroj laŭte kaj klare, ĉar la princo estis kuraĝa kaj fortika viro, kaj la muziko jam mutiĝis je la svingo de lia mano.

En la blua ĉambro staris la princo, kun grupo de palaj korteganoj ĉe sia flanko. Unue, kiam li parolis, estis ioma ekkuro de la grupo al la entrudulo, kiu en tiu momento ankaŭ estis tute proksima, kaj nun per malrapidaj kaj majestaj paŝoj venis pli apuden al la parolinto. Sed pro ia nedirebla timo, per kiu la frenezaj pretendoj de la maskulo inspiris la tutan amason, troviĝis neniu, kiu etendis manon por lin kapti; tiel ke, sen malhelpo, li preterpasis je malpli ol jardo la princon mem; kaj, dum

la vasta kunvenintaro, kvazaŭ unuimpulse, retiriĝis de la mezo de la ĉambro ĝis la muroj, li marŝis seninterrompe, sed per la sama gravmiena kaj malrapida paŝado, kiu lin distingis de la komenco, tra la blua ĉambro en la purpuran — tra la purpura en la verdan — tra la verda en la oranĝan — tra tiu ĉi denove en la blankan — kaj eĉ de tie en la violan, antaŭ ol fariĝis decida movo por lin haltigi. Tiam tamen princo Prospero, freneziga pro kole-rego kaj la honto de sia momenta malkuraĝo, rapide trakuregis la ses ĉambrojn, dum neniu lin sekvis pro morta teruro, kiu ĉiun kaptis. Li alte portis eltiritan ponardon, kaj jam proksimiĝis, en rapida impetueco, je tri aŭ kvar futoj de la foriranta figuro, kiam ĉi tiu, atinginte la finon de la velura ĉambro, sin turnis subite kaj alfrontis sian persekutanton. Aŭdiĝis akra krio kaj la ponardo falis brilante sur la nigran tapiŝon, sur kiun, tuj poste, falis mortsternita princo Prospero. Tiam, vokante al si la sovaĝan kuraĝon de malespero, aro da festantoj tuj sin ĵetis en la nigran ĉambron, kaj, kaptinte la maskulon, kies alta figuro staris rekta kaj senmova en la ombro de la ebena horloĝo, ekspiregis pro nedirebla teruro je la eltrovo, ke la tombvestaĵoj kaj kadavreca masko, kiujn ili tuŝis per tiel kruda fortego, enhavas neniun palpeblan formon.

Kaj nun konfesiĝis la ĉeesto de Ruĝa morto. Li estis veninta kiel stelisto en la nokto. Kaj unu post unu falis la festantoj en la sang-rositaj haloj de sia festado, kaj mortis ĉiu en la malespera pozo de sia falo. Kaj la vivo de la ebena horloĝo eliris kun tiu de la lasta gajulo. Kaj la flamoj de la tripiedoj mortis. Kaj Mallumo kaj Putrado kaj Ruĝa morto regis senlime super ĉio.

Edgar Allan Poe

El la angla tradukis Afomo

Muneto Abe

I.

Falis la fortikaĵo de Koromogava, batale mortis Sadata Abe, kaj Muneto, lia frato, nun restas kaptito ĉe generalo Joŝiije de Minamoto en Kioto, kaj estas ekzekutota post nelonge.

Ĉiutage vizitas lin scivolaj korteganoj por vidi, kiel aspektas la sovaĝa kamparulo-militisto, kiu alvenis el malproksima Oŝu. Iun tagon la korteganoj alportas branĉon da prunfloroj, kaj montrante ĝin al li, demandas lin ĉu li konas ĝin. La korteganoj supozas, ke la kamparulo ne scias eĉ la nomon. Muneto, ĉirkaŭligita per ŝnuro kaj sidanta surtere, rigardante momenton sur la insultantajn korteganojn eldiras versaĵon, verkitan senprokraste:

*Mi ne scias kiel nomas
Tiujn florojn kortegano;
Ili prunaj ŝajnas al mi,
Senkultura kamparano.*

Kia miro ĉe la korteganoj, ke li ne nur scias la nomon de la floroj, sed ankaŭ posedas poezian talenton!

En la momento, kiam gardanto estas rekondukonta lin al malliberejo, aŭdiĝas voĉo: "Atendu, Muneto!" Jen aperas antaŭ li generalo Joŝiije, kun eltirita glavo en la dekstra mano. Muneto, kiu tuj komprenas, ke venas al li la lasta momento, haltas, sidiĝas sur pavimon de la korto, kaj ferminte la okulojn trankvile atendas ekzekuton. Joŝiije alproksimiĝas, kaj staras post la dorso de Muneto. Dum momento li rigardas la kolon de Muneto, etenditan por ricevi baton de la akra klingo, sed, strange, ne la kolon tuŝas la klingo, tamen la ŝnuron ĝi detranĉas por liberigi la kaptiton.

"Bravulo," diras la generalo, "vi estas same ĝentila kaj klera kiel via mortinta frato Sadato!" Li eningigas la glavon, kaj foriras.

Muneto, mirigita de tiu neatendita ago de la generalo, staras momente duonsveninta, sed anstataŭ ekĝoji, ke lia vivo estas savita, li ŝajnas profunde kordolorigita.

II.

Iun malvarman vintran tagon vagas kompatinda virino sur strato en Kioto, kun *kokju*, japana violono, subbrake, akompanata de knabino kaj knabo. Ŝia ĉifonita vestaĵo flirtas en frosttremiga vento. La ĉielo malheliĝas; estas tuj neĝonte. La geknaboj ektemas kaj plendas al

la patrino pri malvarmo kaj malsato. Je tiu netolerebla plendo de siaj infanoj la patrino intence ŝajnigas kole-ron, kaj riproĉe parolas: —

”Kion vi diras? Kial vi tiamaniere timas malvarmon? Vi ambaŭ naskiĝis en la malproksima Oŝu, kie estas multe pli malvarme! Kvankam ni nun almozpetas ludante la *kokju*, tamen vi devas ĉiam memori, ke vi estas familianoj de la famekonata *samurai* Sadato Abe. Vi bone scias, ke paĉjo brave mortis kaj onĉjo nun estas ie en tiu ĉi cefurbo kiel kaptito. Pripensu momente, kial ni tri alvenis tien ĉi, vojaĝinte de tiel malproksime. La sola celo estas venĝi al la malamiko generalo Joŝiije la morton de paĉjo, pro kio ni devas laŭeble peni renkonti onĉjon, venkante kian ajn malfacilaĵon, antaŭ ol la celo estos finfine atingita. Kial vi, gefiloj de la brava Sadato, estas tiel malkuraĝaj kaj plendas pro negravaj malvarmo kaj malsato? Rememoru, forlasinte hejmon vi ambaŭ estis tiel ekscititaj; kaj nun, kiel malkuraĝaj!”

Buŝe ŝi, Sodehagi, tiel severe riproĉas siajn du infanojn, sed doloras al ŝi la koro. Jam pasis ĉirkaŭ unu jaro, de kiam ili forlasis la hejmon. Singardeme ŝi evitas demandi publike, kie loĝas ŝia bofrato Muneto; ŝi do vagas ĉiutage tien kaj reen kune kun la du gefiloj por trovi lin per si mem.

Verdire, Sadato kaj Muneto estas ribelintoj kontraŭ la imperiestro, kaj generalo Joŝiije ilin venkis kiel koman-

danto de la imperiestra armeo, marŝinte malproksimen al Oŝu laŭ ordono de lia imperiestra Moŝto. Sodehagi do devus instrui al la gefiloj esti fidelaj al lia Moŝto, kaj sekve respekti la generalon, sed, kiel edzino sindona al sia kara mortigita edzo, ŝi fariĝis tiel ekscitita, ke ŝi forgesas la gravajn devojn de fidela regato kaj de prudenta patrino. La mondo ekzistas al ŝi nur por plenumi venĝon pro la edzo.

”Vi devas ĉiam esti singardemaj kontraŭ arestantoj, kiuj eble serĉados nin, familianojn de la ribelinto Sadata, kaj eĉ se iu malfacilaĵo okazos ai ni, ni devos esti ĉiam kuraĝaj kaj ĝin elporti.” Kiam la patrino tiel fervore admonas la gefilojn, ĝuste tiam alproksimiĝas de malantaŭe altkreska viro en eleganta kortega vesto. La timemaj infanoj teniĝas al la patrino kaj mallaŭte demandas: ”Ĉu li ne estas arestanto, panjo?”

Sodehagi subite haltas; la rigardoj ŝia kaj de la preterpasanto renkontiĝas kvazaŭ io inspiras ilin sammomente. Post disiĝo, Sodehagi pensas, ke liaj trajtoj, precipe la dikaj brovoj kaj fortika staturo, devas pruvi, ke li estas la jam delonge serĉata Muneto mem, sed tute nekompreneble estas al ŝi, ke li nun ŝajnas servanto de la malamiko, senhonte portante kortegan veston.

”He, Kokinjo (Kokimi) kaj Kiĉjo (Kijodo), kuru al la sinjoro ĵus preterpasinta kaj demandu, ĉu li konas vin ambaŭ. Ŝajnas al mi, ke mi konas lin, sed se li ne konas

vin, nenion diru al li, eĉ se li demandos vin, kies gefiloj vi estas. Rapidu, rapidu!”

”Sed ĉu li ne povas esti arestanto, panjo?”

”Ne, certe ne, kuru al li antaŭ ol malfruiĝos . . . Ve, kial vi ankoraŭ hezitas? Hontu, ke vi ne meritas esti gefiloj de la brava *samurai* Sadato!”

La du infanoj devige forkuras al la viro tra la strato, kie pro la frostremiga vento estas preskaŭ neniu pasanto. Ili fine atingas lin ĉe la angulo de la strato, kaj alvokas:

”He, atendu, sinjoro kortegano!”

Senresponde li sin turnas al la infanoj.

”He, sinjoro, ĉu vi konas nin?” Tiel dirante, ili proksimiĝas al li, kaj atente rigardante Kijodo ekkrias:

”Hura! Onĉjo vi estas!”

La braketoj de Kijodo tuj ĉirkaŭpremas lian talion. Muneto, surprizita de tiu neatendita renkonto, firme karesas la nevon kaj diras:

”Ho, Kiĉjo mia!”

Kokimi, iom deteniĝema, salutas la onklon apartigante sin de li, kaj subpremante la korbatojn pro ĝojego, diras:

”Onĉjo, kiel longe ni kune kun panjo jam sopiris al vi!”

”Ha, jen Kokinjo ankaŭ!” diras Muneto. ”Vere nedisputebla estas sanga interrilato: kiam mi preterpasis vin

antaŭ momento, io neesprimebla sugestiĝis al mi, kvankam tiuj mizeraj figuroj viaj tute ne povis rememorigi vin al mi . . . Kie estas panjo?”

”Jen, panjo atendas vin, rapidu do al ŝi kaj ĝojigu ŝin kiel eble plej baldaŭ!”

III.

Akompanata de la genevoj Muneto revenas al la loko, kie Sodehagi solece staras ĉiam singardeme ĉirkaŭrigardante. Vidante ŝian mizeran figuron la brava *samurai* ne povas deteni larmojn.

”Ho, Muneto!”

”Ho, bofratino! Sed kia mirinda ŝanĝo!”

Silento regas momente, kaj poste Sodehagi diras:

”Je la lasta disiĝo en la militkampoj ni ne havis okazon detale interparoli, sed mi bone memoras, ke vi promesis al mi, ke vi estos ĉiam zorgema dum kaptiĝo, por ke vi povu venĝi je generalo Joŝiije; sed laŭ via nuna vesto ŝajnas al mi, ke vi ne plu estas kaptito, sed kredeble fidela servanto lia . . .”

”Tian plendon de vi mi jam de longe antaŭvidas, sed aŭskultu, bofratino, kion mi rakontos. Depost mia malliberiĝo ĉe Joŝiije kiel kaptito, mia vivo estis kvazaŭ flameto antaŭ vento; ĉiun momenton mi atendis ekzekuton, dum mi neniam forgesis, ke mi iamaniere liberigu min de ĉirkaŭligita ŝnuro por min ĵeti sur la generalon

kaj plenumi la longe deziritan venĝon. Foje vizitis min scivolaj korteganoj, kiuj eble pensis, ke mi, sovaĝa militisto el malproksima Oŝu, scias nenion alian ol batali, kaj montris al mi prunoflorojn kaj moke demandis, kio ili estas. Bolis mia tuta sango pro kolero je tiu ofendo, sed ĝuste tiam ekflamis en mi poezia ideo, kiun mi antaŭe posedis pro via afabla instruado. Mi tuj verkis versaĵon kaj eldiris ĝin antaŭ ili. Joŝiije venis tien, kaj tute neatendite li, anstataŭ mortigi min, detranĉis la ĉirkaŭligitan ŝnuron, kvazaŭ ordonante al mi, ke mi liberigu min laŭvole.”

”Dio! Li savis vin pro tio, ke vi diferencas de ordinraj militistoj, konante literaturon?”

”Kredeble. Tuj ĵeti min sur lin por plenumi mian deziregon mi ne povis. Mi estas *samurai*, estas emocia. Malsame al multaj sentaŭgaj korteganoj, generalo Joŝiije estas kompatema, grandanima kaj klera. Li foje pardonis fraton Sadato, kaj nun min, ambaŭ ribelintojn, nur pro tio, ke ni konas literaturon krom batalarton. Vere li estas patrono al ni. Mia glavo, kiu ja falĉis militkampojn en Oŝu, ne povis ne malakriĝi antaŭ la generalo.”

”Vi do nun efektive servas lin, ĉu?”

”Jes, sinjorino! ’Vera *samurai* volonte mortus por sia vera patrono,’ tiel diras proverbo. Mi nun estas fidela servanto lia, mi deklaras.”

Tiu neatendita respondo multe surprizas Sodehagi. Kiel ajn kompatema kaj grandanima estas Joŝiije, li estas efektive malamiko de la familio Abe, sekve estas nature, ke Sodehagi surpriziĝas aŭdante la decidan respon-
don.

”Ve, kiel malbenita vi estas!” La miro de Sodehagi nun sanĝiĝas en ofendon, larmoj verŝiĝas. ”Pripensu momente. Sadato efektive batalis kontraŭ la imperiestra armeo, li certe estis ribelanto, sed kio estas la kaŭzo de lia ribelo? Kiu piedbatis la kapokusenojn de la trankvile dormantaj loĝantoj de Oŝu? Mia karulo Sadato ne ribelis sence, nek batalis senkaŭze, vi bone scias. Mal-feliĉe li malvenkis kaj fine pereis. Pro tio, rigardu, eĉ ĉi tiuj naivaj infanoj suferas tiel mizere. Malbeni la generalon estas tute senutile, vi scias, por rehavigi al ili la antaŭan feliĉon, tamen ni nepre devas konsoli la animon de mia karulo, kiu mortis plena de ofendiĝo.”

Preskaŭ freneza ŝi riproĉas lin kun senĉesaj larmoj. Muneto kapoklinas kaj nenion respondas. Sodehagi rigardas lin malestime kaj daŭrigas:

”Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas, kion mi diras, Muneto? Aŭskultu, estus prave, se alia homo estus kortuŝita pro la kompto kaj grandanimeco de la generalo, sed viaokaze tute ne. Kiu estas la sola celato de nia venĝo? Kiu ofendis vin mem kiel kaptiton? Pro kiu mi devas turmenti tiujn naivajn infanojn tiel terure? Ĉu vi jam forge-

sis, ke mi, kiu devus esti sekvinta mian karulon, kontraŭvole ankoraŭ postvivas kaj venas tien ĉi travivante ne-esprimeblajn malfacilaĵojn, nur por apogi min sur viaj vortoj je la lasta disiĝo? Vi ankaŭ elportis hontindan kaptiĝon kaj venis tiel malproksimen nur por plenumi la promesitan gravan agon, ĉu ne? Ke Joŝiije estas bonkora kaj kompatema, estas jam de longe konata fakto, vi tion sciis antaŭ ol vi fariĝis kaptito. Vi nun estimas la malamikon pli ol viajn parencojn. Se ne estas senprudente al mi diri, vi kvazaŭ surportas ĉapelon kaj ŝuojn reciproke interŝanĝitajn.”

Muneto ankoraŭ firme fermas la buŝon kaj senmove staras. Sodehagi ankaŭ silentas, ne kuraĝante diri ion plian. Kijodo, kiu rigardas jen la patrinon, jen la onklon, aŭskultante la nekompreneblajn parolojn de la patrino dum frostremiga ventado, sin turnas al la onklo kaj diras:

”Tiu Joŝiije priparolita estas nia abomenega malamiko, je kiu ni nepre devas venĝi. Helpu al ni, onĉjo, kaj ni plenumu la deziregon kiel eble plej baldaŭ.” Tiel dirante, Kijodo pretenas la onklon per lia zono kaj ekskuas por inciti lin. La dika korpo de la staranta onklo, kiu ŝajnas kvazaŭ arbego profunde enradikiĝinta, ŝanceliĝas facile per la manetoj de Kiĉjo, sed ankoraŭ li daŭrigas silenti.

”Ne parolu plu, Kiĉjo,” Sodehagi senpacience diras al sia fileto, ”tiu onĉjo ne plu estas la antaŭa onĉjo: Muneto, brava frato de via patro, ne plu ekzistas en la mondo, tiu ĉi homo estas nur nekonata pasanto, pro kiu ne estas necese koleri aŭ malkontentiĝi. Nu, ni foriru.”

Ŝi prenas la du infanojn per la manoj kaj estas foriron-ta. Muneto fine levas la vizaĝon kaj kun decido alvokas:

”Bofratino, kie vi loĝas?”

”Kiel mi, postvivantino de ribelinto, povas sciigi pri nia rifuĝejo al vi, kiu estas nekonatulo, kaj kies alvoko ’bofratino ’ jam estas abomena al mi?”

Sodehagi sin turnas aliflanken kaj ekpaŝas.

”Viaj diroj vere estas trapikintaj min ĝis la ostoj.”

Fluas varmaj larmoj sur la vangoj de Muneto.

”Eh? Kio?”

”Jen kio. Morgaŭ lia moŝto Joŝiije ĉasiros al la kampo de Iĉihara . . . uzante tiujn okazojn . . . mi jam decidis . . . Vi scios la rezulton morgaŭ.”

”Eh, Eh! Vi do estas mia vera bofrato, Muneto! Ho, nenion plu mi diros. Pardonu, ke mi ĵus eldiris senprudentaĵojn.”

”Kiĉjo mia, morgaŭ mi donacos al vi ion plaĉindan. Ĝis revido, bofratino!” Muneto, tiel dirinte, rapide foriras. Sodehagi kune kun siaj du infanoj momente rigardas lin de malantaŭe. Poste la tri malaperas en densa neĝblovo.

IV.

La hieraŭa blovado jam ĉesis, la ĉielo estas blua, tie kaj alie oni vidas blankajn postsignojn de neĝo brilantajn sur la kampo de Iĉihara. Por rajdekskurso aŭ ĉasado la vetero estas plej taŭga.

Generalo Joŝiije nun alvenas surĉevalo, akompanata de kelkaj sekvantoj. Ĉiu portas ĉasveston kaj surdorse sagujon. Muneto ankaŭ sekvas la estron tre proksime, ĉar la pafarkon de la generalo li portas.

Laŭ la promeso, kiun Muneto devis fari al Sodehagi pro sia ripetita plendo, li kontraŭvole estas preta mortigi la estron, dum tiu ĉi, tute ne sciante pri la minacanta malfeliĉo, plene konfidas al Muneto kaj favoras lin. Muneto, ĉiam atentema por efektiviĝi la intrigon, tenas sin kiel eble plej proksima al la estro kaj ĉiam atendas okazon. La kampo estas senhoma; ambaŭ kune jen eniras en densan arbaron, jen preterpasas sub ombron de altkreska herbejo.

Joŝiije fervore serĉas ĉasaĵojn, Muneto gravan okazon de venĝo. Sed Joŝiije, lerta rajdanto, tiel vigle galopigas sian ĉevalon, ke estas tute neeble por Muneto kapti la okazon. Jen aperas vulpon.

”Muneto,” alparolas Joŝiije, ”atentu kiamaniere mi mortigos la vulpon.”

Li celas la kurantan vulpon, kaj je la ekzumo de la pafarko la sago eksiblas. La pozo de Joŝiije estas mirinde

trankvila, dum agitiĝo de la intrigulo Muneto atingas ĝis ekstremo.

”Muneto, alportu la ĉasaĵon.”

”Jes, via moŝto!” Muneto galopas al la ĉasaĵo; dume, li diras al si mem:

”Ve, bedaŭrinde! Kial mi ne atakis lin dum li celis la vulpon? Kian utilon havas tiuj ĉi fortikaj brakoj kaj akra glavo?”

La ĉevalo galopas ĉirkaŭ 200 metrojn; li malsupreniras tie, kie la vulpo kuŝas surtere. Li ekzamenas la beston, sed strange, eĉ malgrandan vundon ĝi ne estas ricevinta; la sago estas profunde enpenetrinta la teron kelkajn metrojn malantaŭe. Mistera, nekomprenebla, la pafmaniero de la estro! Muneto alprenas la ĉasaĵon, eltiras la sagon de la tero kaj rapidas al la estro.

”La vulpo eble estas mortinta, ĉu ne?”

”Jes, via moŝto,” respondas Muneto.

”Kunligu la krurojn per ŝnuro, ĉar ĝi poste reviviĝos. Ĝi nur svenis pro mirego per la eksiblo de mia sago, kiun mi intence pafis super ĝia kapo.”

Kunligante la krurojn de la vulpo laŭ la ordono, Muneto meditas pri sekvonta procedo por efektiviĝi la intrigon.

”Jen la sago, kiun mi reportis, via moŝto.” Je tiuj vortoj li pliproksimiĝas al la generalo; lia dekstra mano estas baldaŭ atingonta la tenilon de la glavo. Joŝiije tran-

kvile klinas la korpon al li, kaj prezentante la surdorsan sagujon, diras:

”Bone, enmetu ĝin.”

Tute konfidante al la fideleco de Muneto, Joŝiije nenion suspektas, kaj en tiu sama pozo rigardas for por serĉi aliajn ĉasaĵojn, dum Muneto sin okupas pri enmetado de la sago. Jen la plej konvena okazo, kiu neniam poste povos veni, se li tiun ĉi fojon perdos! Sed kiel Muneto, *samurai*, povas aĝi tiel malestiminde kiel ataki senĝardan malamikon? Ho, kia ajn torturo turmentu lin, li certe ne povas perfidi la konfidon de sia nova patrono! Li enmetas la sagon, kiel ordonite, sed la mano ne povas eĉ tuŝi la tenilon de la glavo. Li fariĝas kvazaŭ senkonscia, kaj klinante la kapon, malantaŭenigas sian ĉevalon.

Ĝuste tiam la vulpo reviviĝas kaj ĉirkaŭrigardas. Ĝi estas ĉasaĵo unufoje mortigita nevundite kaj nun reviviĝanta, dum Muneto estas kaptito, kiu jam meritis ekzekuton, sed ankoraŭ nun vivas. Ŝajnas al li, ke ekzistas komuneco inter la du.

La aliaj sekvantoj, kiuj sin okupis je ĉasado en la apuda herbejo, alkuras por vidi la unuan ĉasaĵon de tiu tago. Rigardante la malgajan vizaĝon de Muneto, ili komencas iom suspekti lin. De tiam ili zorge sin tenas apud la estro por protekti lin kontraŭ eventuala malfeliĉego.

V.

Muneto revenas hejmen el la kampo, kaj sidas sola en la ĉambro preskaŭ perdinte sian memkonscion. Ĉu li vere ne taŭgas kiel viro kaj kiel *samurai*? Ho, jes, li certe taŭgas. Lia penso estas racia, lia spirito estas heroo, lia animo kavalireca, plue li estas lerta kaj brava militisto. Kial do li malsukcesis en sia intenco? Ĉu li jam forgesis la seriozan promeson, kiun li faris nur hieraŭ al sia bofratino, kiu kune kun la du gefiloj tiel malproksimen venis, elportante multajn malfacilaĵojn nur por instigi lin? Post profundigo en meditado li diras al si mem:

”Nu, por efektivigi la celitan intrigon, mi devas esti ne vera *samurai*, sed simpla ribelanto kiel antaŭe.”

La densa nubo sur lia koro subite foriĝas; li ekstaras kun kontenta rideto, kvazaŭ li estus farinta grandan elpensaĵon.

’Kioma horo?’ li tiel mezuras la silenton de la nokto. ”Baldaŭ estos noktomezo.”

”Jes, mi, Muneto, estas ribelanto kiel antaŭe, ne *samurai*.” Li ripete klarigas tion al si mem, eltiras sian glavon, kaj ŝteliras en la malantaŭan korton. La spegulosimila vintra luno ĵetas palajn radiojn sur la akvon de la lago, pli malproksime de kiu staras la loĝejo de Joŝiije. Muneto konas ĉiun detalon de la domo. Nerimarkite li nun eniras en la koridoron de la dormoĉambro de Joŝiije, kaj staras ĉe la pordo por certiĝi, kiel estas interne.

Neatendite de li, aŭdiĝas mallaŭtaj paroloj de iu servanto al la estro. Muneto des pli miras, ĉar la paroloj koncernas lin mem.

”Prave estas, ke via grandanima moŝto pensas tiamaniere rilate al Muneto, sed li estas la frato de Sadato, kiu mortis kun neforgesebla ofendiĝo pro la malvenko de sia 12-jara militado. Kial do Muneto povas forgesi venĝon? Laŭ mia opinio li ruze ŝajnigas fidelecon al vi nur por efektiviĝi sian intrigon. Bonvolu, mi sincere petas, ne ripeti tian danĝeran senzorgemecon, ke via moŝto hodiaŭ ricevis de li sagon en vian surdorsan sagujon.”

”Ne diru sensencaĵon plu,” respondas Joŝiije, ”mi jam de longe scias tion, kion vi diras, sed reformi perfidulojn el sia servantaro estas la virto de la estro. Provu min per Muneto, se li estus perfidulo, ĉu mi vere taŭgas kiel estro, aŭ ne. Se mi ne taŭgus, kontenta mi estus, ke oni mortigu min. Sed atentu, ke la morto de Sadato ne estis pro privata malamikeco; mi venkis lin kiel komandanto de la imperiestra armeo. Kiu ajn estis la kontraŭulo, li meritis oficialan punmortigon. Kvankam Muneto estas vera frato de Sadato, mi kredas, ke li ne estas tia malsaĝulo, ke li intrigas kontraŭ mi. Sovaĝa kamparulo li estas, kaj oni povas timi lin, sed mi aparte ŝatas lian simplecon kaj honestecon. Mi dankas vin pro via sincera konsilo, sed rilate al Muneto tiu konsilo estas tute superflua, mi certigas vin.”

Tiu decidema respondo de Joŝiije, en kiu oni povas vidi majestan dignecon, kaj ankaŭ senliman favoron al Muneto, ankoraŭfoje tiel forte emocias la subaŭskultanton, Muneto, ke li senkonscie faligas sian glavon. Je tiu sono malfermiĝas la pordo, kaj eliras la servanto, kiu rigardante lin sub la lunlumo ekkrias:

”Vi, Muneto, intrigulo!”

Joŝiije sekve eliras, sed diras tre trankvile:

”Muneto, vi, rigardante la belan lunon, sopiras pri via familio. Kia poeziema delikateco!”

Profunde kortuŝita de tiuj afablegaj vortoj, Muneto tuj genufleksas surteren, kaj diras kun larmoj:

”Via moŝto, mian malpurigitan koron mi nun malkaŝe elmontros al via moŝto sub la brilantaj puraj lunradioj. Rekompence honorigu min, mi petegas, per la glavo de via moŝto sur mian kolon. Morti per la propra mano de altestimata via moŝto estos al mi eterna gloro.”

Joŝiije ekbalancas la kapon kaj diras:

”Mi konsentas vian peton, sed antaŭ ĉio rakontu la kialon.”

”Mil dankojn, via moŝto.” Muneto sincere adoras la generalon, kaj detale rakontas, dum verŝado de varmaj larmoj, pri sia vera situacio, pro kiu li tiel multe ĉagre niĝas. Joŝiije ankaŭ verŝas larmojn de kunsento. La servanto, kiu ĝis nun rigardis lin simple kiel sovaĝan intri-

gulon, la unuan fojon komprenas la signifon de varmaj larmoj de vera heroo.

Joŝiije kore aplaŭdas Muneton pro liaj vireco kaj kavaliereco, sed diras:

”Kiel mi povas ekzekuti vin?”

”Tiu favoro de via moŝto multe ĉagrenas min. Se via moŝto ne povas glori min per la glavo de via moŝto, bonvolu ekzili min malproksimen kiel ribelanton.”

Konforme al tiu insista peto, sed tre kontraŭvole, Joŝiije fine ekzilas lin al Kiuŝu.

— — —

Tiuj bravuloj, kiuj poste sindone batalis por la Minamoto familia en diversaj militkampoj sub la nomo *Macuraliganoj*, estis devenuloj de Muneto.

Japana historia rakonto el la deknua jarcento

El la japana tradukis K. Takahaŝi

La malfeliĉa fianĉo de Aŭrelia

La faktoj en la sekvanta rakonto venis al mi en letero de juna fraŭlino tute ne konata de mi, kiu nure subskribis ĝin "Aŭrelia Maria". La kompatindulino estas preskaŭ korrompita pro la malfeliĉoj, al kiuj ŝi devis submetiĝi, kaj en ĉi tiu dilemo ŝi sin turnas al mi por helpo. Aŭskultu ŝian malĝojigan rakonton: —

Ŝi diras, ke kiam ŝi estis deksesjara, ŝi renkontis kaj enamiĝis, kun la tuta sindonemo de pasia karaktero, junulon nomata Williamson Breckenridge Caruthers, kiu estis proksimume ses jarojn pli aĝa ol ŝi. Ili fariĝis gefianĉoj, kaj por iom da tempo ŝajnis kvazaŭ ilia kariero destiniĝas esti karakterizata de imuneco kontraŭ malĝojo. Sed fine la tajdo de la sorto turniĝis; juna Caruthers infektiĝis per variolo, kaj post lia resaniĝo lia vizaĝo estis markita kiel vaflomodelilo, kaj lia bela aspekto foriris por ĉiam. Aŭrelia unue pripensis la ĉesigon de la fianĉa kontrakto; sed kompto por sia malfeliĉa amanto igis ŝin nur prokrasti la edziĝon.

La tagon mem antaŭ tiu fiksita por la edziĝo, Breckenridge, okupite per rigardo de balonflugado, marŝis en puton kaj frakasis unu el la kruroj — kaj oni devis amputi ĝin super la genuo. Denove Aŭrelia inkliniĝis nuliĝi la fianĉiniĝon, sed denove la amo triumfis; kaj ŝi antaŭaranĝis la edziĝtagon, kaj donis al la amanto alian okazon pli bone konduiti.

Kaj denove malfavora sorto atingis la malfeliĉan junulon. Li perdis unu el la brakoj sekve de tro frua malŝarĝo de Kvara-de-Julio-kanono; kaj post malpli ol tri monatoj, la alia brako perforte eltiriĝis sekve de implikiĝo en kardmaŝino. La koro de Aŭrelia estis preskaŭ premegata de ĉi tiuj afliktoj. Ŝi ne povis ne profunde malĝojiĝi, vidante sian amaton pecope pasantan for de ŝi: ŝi sentis, ke li ne povos ĉiam esti sub tia malfeliĉega procedo de depreno; kaj en sia larmoplena malespero, ŝi preskaŭ bedaŭris, same kiel makleristoj, kiuj tro longe tenas akciojn kaj perdas okazon de gajno, ke ŝi ne akceptis lin kiel edzon en la komenco, antaŭ ol li suferis tian timegigan malpliĝon. Tamen ŝia brava animo subtenis ŝin, kaj ŝi decidis ankoraŭ iom pli longe toleri la nenaturan emon de sia amiko.

Denove la edziĝtago alproksimiĝis, kaj denove malfektivigo superombris ĝin. Caruthers malsaniĝis je erizipelo kaj perdis la uzon de unu el la okuloj. La amikoj kaj parencoj de la edziniĝontino, opiniante, ke ŝi jam to-

leris pli multon ol oni povas juste atendi de ŝi, venis al ŝi kaj insistis, ke la edziĝkontrakto estu nuligata; sed post iom da ŝanceliĝo, Aŭrelia larĝanime diris, ke ŝi jam senpasia pripensis la aferon, kaj ne povas trovi, ke Breckenridge estas kulpa. Do ŝi ankoraŭ unu fojon prokrastis la edziĝtagon — kaj li rompis la alian kruron.

Estis malĝojiga tago por la kompatinda junulino, kiam ŝi vidis la ĥirurgojn respektege forportantaj la sakon, kies uzojn ŝi eksciis per antaŭa sperto; kaj ŝia koro diris al ŝi la maldolĉan veron, ke ankoraŭ unu peco de ŝia amato estas for. Ŝi sentis, ke la kampo de ŝiaj korinklinoj iĝas tagon post tago pli limigita, sed denove ŝi sulkigis la frunton al siaj parencoj, kaj refaris la fianĉiniĝon.

Nelonge antaŭ la tempo fiksita por la edziĝo, alia katastrofo okazis. En la lasta jaro la indianoj de Owens River skalpis nur unu viron. Tiu viro estis Williamson Breckenridge Caruthers.

Li estis rapide hejmeniranta kun ĝoja koro, kiam li perdis por ĉiam sian hararon; kaj en tiu maldolĉa horo, li preskaŭ malbenis la erare montritan kompaton, kiu ŝparis al li la kapon.

Fine, Aŭrelia estas forte embarasata pri tio, kion ŝi devas fari. Ŝi skribas kun vere virina sento, ke ŝi ankoraŭ amas sian Breckenridge — ŝi ankoraŭ amas tiom el li, kiom restas — sed ŝiaj parencoj forte kontraŭstaras la edziĝaranĝon, ĉar li ne havas posedaĵon, kaj estas mal-

eble al li labori, kaj ŝi ne havas sufiĉe da monrimedoj por komforte subteni ambaŭ. "Nu, kion fari?" ŝi demandas al mi — demando, kiu implikas la vivlongan feliĉon de unu virino kaj preskaŭ du-trionoj de viro; kaj mi opinias, ke mi prenis sur min tro grandan respondecon, se mi pli multe farus, ol prezenti proponeton. Ĉu estus bone rekonstrui lin? Se Aŭrelia povas elporti la elspezon, ŝi provizu sian senmembrigitan amanton per lignaj brakoj kaj lignaj kruroj, kaj vitra okulo, kaj peruko, kaj donu al li alian okazon; donu al li naŭdek tagojn, ne pli, kaj se li ne intertempe rompos al si la kolon, edziniĝu kun li, kaj akceptu la riskojn. Ŝajnas al mi, Aŭrelia, ke ne estas multe da risko iamaniere, ĉar, se li persistas en la emo sin difekti ĉiun fojon, kiam li vidas oportunan okazon, lia plej proksima eksperimento certege faros finon al li — kaj tiam vi bone statos, edzinigita aŭ ne. Se vi estos edzinigita, la lignaj kruroj, kaj ĉiuj aliaj valoraĵoj kiujn li posedos, herediĝos de la vidvino; kaj kiel vi povas kompreni, vi ne perdos ion krom la ameme garditan fragmenton de nobla sed plej malfeliĉa edzo, kiu honeste penis juste agi, sed kies eksterordinaraj instinktoj malhelpis lin. Provu tion, Maria! Mi zorge kaj bone pripensis la aferon, kaj tio estas la sola ŝanco, kiu laŭ mia opinio okazos por vi. Se Caruthers estus komencinta per rompo de sia kolo, tio estus liaparte bona ideo, sed ĉar li opiniis bone elekti malsaman agmanieron, kaj daŭri-

gi sian vivon dum kiom eble plej longa periodo, mi opinias, ke ni ne devos riproĉi lin pro tio. Ni devas agi kiel eble plej bone laŭ la cirkonstancoj, kaj peni ne furioziĝi kontraŭ li.

Mark Twain

El la angla tradukis W. M. Harvey

La rakonto de la infano

Iam, antaŭ multaj jaroj, estis vojaĝanto, kaj li ekvojaĝis. Estis magia vojaĝo, kiu estis ŝajnonta tre longa komence, kaj tre mallonga kiam li duone finos ĝin.

Li laŭiris iom malluman vojeton dum certa tempo, renkontante nenion, ĝis fine li venis al bela infano. Do li diris al la infano: "Kion vi faras ĉi tie?" Kaj la infano diris: "Mi ĉiam ludas. Venu ludi kun mi!"

Do, li ludis kun tiu infano la tutan tagon kaj ili estis tre gajaj. La ĉielo estis tiel blua, la suno tiel hela, la akvo tiel brileta, la folioj tiel verdaj, la floroj tiel belaj, kaj ili aŭdis tiajn kantbirdojn kaj vidis tiom da papilioj, ke ĉio estis bela. Tiel estis dum serena vetero. Kiam pluvis, ili amis observi la falantajn gutojn, kaj flari la freŝajn odorojn. Kiam blovis, estis rave aŭskulti la venton, kaj imagi kion ĝi diras, kiam ĝi venas kuregante el sia domo — kie estas tiu, ili scivolis! — fajfante kaj ululante, pelante la nubojn antaŭ si, fleksante la arbojn, rulsonante en la kamentuboj, skuante la domon kaj igante la maron muĝi en furiozo. Sed kiam neĝis, jen plej bone el ĉio; ĉar pli

ol ion alian ili amis suprenrigardi al la blankaj neĝeroj, falantaj rapide kaj dense, kiel lanugo el la brustoj de milionoj da blankaj birdoj; kaj vidi kiel glata kaj profunda estas la blovaĵo; kaj aŭskulti la silentiĝon ĉe la vojejoj kaj ŝoseoj.

Ili havis multajn el la plej bonaj ludiloj en la tuta mondo, kaj la plej mirigajn bildolibrojn; pri orientaj sabroj, babuŝoj kaj turbanoj, nanoj, gigantoj, ĝenioj, feinoj, blubarbuloj, fabtrunketoj, riĉaĵoj, kavernoj, arbaroj, Valentinoj kaj Orsonoj: ĉiuj novaj kaj ĉiuj veraj.

Sed, unu tagon, subite, la vojaĝanto perdis la infanon. Li vokis lin ree kaj ree, sed ne ricevis respondon. Do, li daŭrigis sian vojon, kaj iris antaŭen dum iom da tempo renkontante nenion, ĝis fine li venis al bela knabo. Do, li diris al la knabo: "Kion vi faras ĉi tie?" Kaj la knabo respondis: "Mi ĉiam lernas. Venu lerni kun mi."

Do li lernis kun tiu knabo pri Jupitero kaj Junono, kaj la Grekoj kaj Romanoj, kaj mi ne scias pri kio, kaj li lernis pli ol mi povus diri — aŭ ol ankaŭ li povus, ĉar multon li baldaŭ forgesis. Sed ili ne ĉiam lernis; ili sin amuzis per la plej gajaj ludoj, kiujn oni iam ludis. Somere ili remis sur la rivero, vintre ili glitkuris sur la glacio; ili estis aktivaj piede, kaj aktivaj ĉevaldorse; pri kriketo kaj ĉiuj pilkoludoj; pri kaptitulejo, leporo-kaj-ĉashundaro, sekvu-la-estron, kaj pli multaj sportoj ol mi povas rememori; neniu povis superi ilin. Ankaŭ libertempojn ili havis,

kaj epifaniajn kuketojn, kaj festetojn, dum kiuj ili dancadis ĝis noktomezo, kaj realajn teatrojn, kie ili vidis palacojn el reala oro kaj arĝento leviĝi el la reala tero, kaj vidis ĉiujn mirindaĵojn de la tuta mondo samtempe. Pri amikoj, ili havis tiel karajn amikojn kaj tiel multajn, ke mankas al mi la tempo ilin kalkuli. Ĉiuj estis junaj, same kiel la bela knabo, kaj ili intencis neniam fremdiĝi unu al alia dum la tuta vivo.

Tamen iun tagon, meze de ĉiuj ĉi plezuroj, la vojaĝanto perdis la knabon same kiel li perdis la infanon, kaj, vane vokinte lin, daŭrigis sian vojaĝon. Do, dum iom da tempo li plueniris, vidante nenion, ĝis fine li venis al junulo. Do, li diris al la junulo: "Kion vi faras ĉi tie?" Kaj la junulo diris: "Mi ĉiam enamiĝas. Venu ami kun mi."

Do, li foriris kun tiu junulo, kaj post nelonge ili renkontis unu el la plej belaj knabinoj iam viditaj — ĝuste similan al Franjo tie en la angulo — kaj laŭ okuloj ŝi similis Franjon, kaj laŭ hararo, kaj laŭ la kavetoj ĉe la vangoj, kaj ŝi ridis kaj ruĝetiĝis ĝuste kiel faras Franjo dum mi parolas pri ŝi. Do, la junulo tuj enamiĝis — ĝuste kiel enamiĝis je Franjo Iu, kiun mi ne intencas nomi, kiam la unuan fojon li venis ĉi tien. Nu! foje oni incitetis lin — same kiel Franjo kutimis inciteti Iun; kaj foje ili malpaciis — ĝuste kiel faris Iu kaj Franjo; kaj ili reamikiĝis, kaj sidis en la mallumo, kaj ĉiutage skribis leterojn, kaj neniam estis feliĉaj malkune, kaj ĉiam okulserĉis unu la

alian ŝajngante ne fari tion, kaj gefianĉiĝis je Kristnasko, kaj sidis tute proksimaj unu al la alia apud la kameno, kaj estis edziĝontaj tre baldaŭ — tute precize kiel Iu, kiun mi ne nomos, kaj Franjo!

Sed la vojaĝanto perdis ilin iun tagon, same kiel li perdis la ceterajn amikojn, kaj, vokinte por ke ili revenu, sed vane, li daŭrigis sian vojaĝon. Do, dum iom da tempo li iris antaŭen vidante nenion, ĝis fine li venis al mezaĝa sinjoro. Do, li diris al la sinjoro: "Kion vi faras ĉi tie?" Kaj la respondo estis: "Mi ĉiam estas okupita. Venu kaj estu okupita kun mi."

Do li ekiĝis tre okupita kun tiu sinjoro, kaj kune ili iris antaŭen tra la arbaro. La tuta vojiro estis tra arbaro, sed ĉi tiu komence estis maldensa kaj verda, kiel printempe; kaj nun ekiĝis densa kaj malluma, kiel somere; kelkaj el la malgrandaj arboj, kiuj plej frue foliiĝis, eĉ komencis bruniĝi. La sinjoro ne estis senkunula, sed kunhavis sinjorinon preskaŭ samaĝan, kiu estis lia edzino; kaj ili havis infanojn, ankaŭ kun ili. Do, ili ĉiuj kune antaŭeniris tra la arbaro, teren hakante la arbojn, farante al si voje-ton tra la branĉoj kaj falintaj folioj, portante ŝarĝojn, kaj forte laborante.

Foje ili venis al longa verda aleo, kondukanta en pli profundajn arbarejojn. En tiaj okazoj ili aŭdis etan voĉon el la malproksimo, krianta: "Patro, patro, mi estas plua infano! Haltu pro mi!" Kaj poste ili vidis tre mal-

grandan formon kuri renkonte al ili, pligrandiĝanta dum la venado. Kiam ĝi atingis ilin, ĉiuj amase ĝin ĉirkaŭis, kisis kaj bonvenigis; kaj tiam ĉiuj kune antaŭeniris.

Foje, ili venis al kelkaj aleoj samtempe, kaj tiam ĉiuj staris senmove, kaj unu el la infanoj diris: "Patro, mi fariĝos maristo," kaj alia diris: "Patro, mi iros al Hindujo," kaj alia: "Patro, mi iros por serĉi bonŝancon kie ajn mi povos," kaj alia: "Patro, mi iros al la Ĉielo!" Do, kun multaj larmoj ĉe la disiĝo, ili iris, ĉiu sola, laŭ tiuj aleoj, ĉiu infano laŭ propra vojo; kaj la infano irona al la Ĉielo suprenflugis en la oran aeron kaj malaperis. Ĉiufoje, kiam okazis tiuj disiĝoj, la vojaĝanto kutimis rigardi la sinjoron, kaj vidis lin rigardi al la ĉielo super la arboj, kie malheliĝis la taglumo kaj komenciĝis la sunsubiro. Li vidis, ankaŭ, ke lia hararo griziĝas. Sed ili neniam povis atendi longtempe, ĉar ili devis fari sian vojaĝon, kaj necesis, ke ili estu ĉiam okupitaj.

Fine, tiel multaj estis la disiĝoj ke restis neniuj infanoj, kaj nur la vojaĝanto, la sinjoro kaj la sinjorino kune iris sian vojon. Kaj jen la arbaro estis flava; kaj jen bruna; kaj la folioj, eĉ de la grandaj arboj, komencis fali.

Do, ili venis al aleo pli malluma ol la aliaj, kaj estis rapidantaj antaŭen, sen rigardo tra ĝi, kiam la sinjorino haltis.

"Mia edzo," diris la sinjorino, "oni vokas min."

Ili aŭskultis, kaj aŭdis voĉon, malproksime en la aleo, kiu diris: "Patrino, patrino!"

Estis la voĉo de la infano, kiu unua diris: "Mi iros al la Ĉielo!" kaj la patro diris: "Mi preĝas, ke ankoraŭ ne. La sunsubiro tre proksimiĝas. Mi preĝas, ke ankoraŭ ne!"

Sed la voĉo kriis: "Patrino, patrino!" ne atentante lin, kvankam lia hararo estis nun tute blanka, kaj larmoj estis sur lia vizaĝo.

Tiam la patrino, jam entirita en la ombron de la mal-luma aleo kaj formoviĝanta kun la brakoj ĉirkaŭ lia kolo, lin kisis kaj diris: "Plej kara mia, oni vokas min, kaj mi iras!" Kaj ŝi estis for. Kaj la vojaĝanto kaj li restis kune solaj.

Kaj pluen kaj pluen ili iris kune, ĝis ili tre proksimiĝis al la fino de la arbaro; tiel proksime, ke ili povis vidi antaŭ si la sunsubiron ruĝe brilanta tra la arboj.

Tamen, ankoraŭ unu fojon, trarompante la vojon inter la branĉoj, la vojaĝanto perdis sian amikon. Li vokis kaj vokis, sed ne venis respondo, kaj elirinte el la arbaro kaj vidante la pacan sunon subiranta preter vasta purpura perspektivo, li venis al maljunulo sidanta sur falinta arbo. Do, li diris al la maljunulo: "Kion vi faras ĉi tie?" Kaj la maljunulo diris kun trankvila rideto: "Mi ĉiam rememoras. Venu rememori kun mi!"

Do la vojaĝanto sidiĝis apud tiu maljunulo, kontraŭ la serena sunsubiro; kaj ĉiuj liaj amikoj mallaŭte revenis

kaj staris ĉirkaŭ li. La bela infano, la belaspekta knabo, la enamiĝinta junulo, la patro, patrino kaj infanoj: ĉiu el ili ĉeestis, kaj li estis perdinta nenion. Do, li amis ilin ĉiujn, kaj estis milda kaj tolerema al ĉiu el ili, kaj ĉiam plaĉis al li observi ilin, kaj ĉiuj honoris kaj amis lin. Kaj mi kredas, ke tiu vojaĝanto devas esti vi mem, kara avo, ĉar tion vi faras al ni, kaj tion ni faras al vi.

Charles Dickens

El la angla tradukis G. M. Hayton

Mortintaj folioj

Hodiaŭ la duan fojon Levkoviĉ faris al mi edziĝproponon. La unuan fojon tio estis printempe, dum pikniko, preskaŭ antaŭ du jaroj, — nun estis aŭtuno, kaj mi revenis en malnova vestaĵo el arbareto.

Mi diris:

”Mi vin dankas, sed, se eble, atendu mian respondon ĝis la vespero.”

Mi ne scias, kion mi atendis vespere, — tamen mi tiel diris.

En nia hejmo sidis la juna arbaristo Jan Vorohoviĉ. Mi aŭdis, ke li gaje ridis pri io, frapetis per sia pafilo, kaj interparolis kun mia patro.

Mi brodis, pensante: ”Li ne devus veni al ni tiel ofte kaj min inciteti. Ĉu eble li malpaciĝis kun Elinjo? Mia patro lin tedas. Kaj mi? . . . Nu, kian valoron mi povas havi por li, sinjoro Vorohoviĉ, arbaristo, la plej bela kaj instruita homo en nia regiono?” . . . Ke li eble divenas miajn sentojn, estus por mi pli terure ol la morto . . . Mi ree pensis: ”Ĉu eble li malpaciĝis kun Elinjo?”

Mi ne scias kial, sed mi firme decidis, ke Vorohoviĉ estas enamiĝinta al Elinjo. Vere, tio estus neniel mirinda: Ela, rozvanga, gracitalia, graseta knabino kun blondaj haroj, ĉiam vestas sin hele, portas silkajn jupejn kaj eĉ unu fojon venis al ni parfumita. Ŝi movas sin brue, vigle kaj alloge ridas, — vera printempa turnvento.

Mi ĵaluzis sin dum mallonga tempo: ĉu do ŝi estas kulpa, ke ŝi estas bela kaj plaĉas al la arbaristo? . . .

Mi atente aŭskultis, pri kio Vorohoviĉ parolas kun mia patro, kaj ne eliris el mia ĉambro, penante konvinki min mem, ke ili min ne bezonas; ili havis ĉion necesan, — manĝetaĵon, mielvinon, sakojn, du komfortajn apogseĝojn apud malfermita fenestro kaj eĉ du tapiŝetojn ĉe la sojlo por viŝpurigi la piedvestojn . . . Tamen poste mi decidis, ke devo de dommastrino estas ĝentileco, kaj mi eliris, min turnante al la gasto kun la vortoj:

”Bonan vesperon!”

”Bonan vesperon, fraŭlino Roza!”

Kiajn sincerajn, belajn okulojn li havas! Estas tute ne eble koleri kontraŭ li!

”Vi venis el la grafina biendomo?” mi demandis, kvankam mi tion ja bone sciis: kie do li povis troviĝi, se ne tie, kie li loĝas kaj havas oficon?

”Jes, mi venis el la grafina biendomo,” — li respondis ĝentile, — ”la grafino vin salutas kaj petas, ke vi venu al ŝi hodiaŭ . . . Fraŭlino Tomaŝevska estos ankaŭ tie.”

Al mi tute ne plaĉis, ke li diris "fraŭlino Tomaŝevska", kaj ne simple "fraŭlino Ela", kiel ĉiam, kvazaŭ li timus nomi ŝin laŭ ŝia baptonomo, kaj malzorge sin apogis al la seĝo.

Mi respondis sektone: —

"Bonvolu transdoni mian dankon al la grafino, sed mi sentas min malbone kaj ne povas viziti ŝin."

Poste, ŝajnigante, ke mi ne rimarkas lian ĉagrenitan mienon, mi min turnis al mia patro.

"Ĉu vi ion bezonas, paĉjo?"

"Ne, mia filineto."

Kaj mi ree foriris en mian ĉambron. Miaj vangoj flamis. Al mi estis ridige kaj honte: pro kio mi ekludis rolon de principino? Oni nur pripensu, efektive . . . la filino de la bienadministranto ne volas iri en la grafinan biendomon! . . . Sed, se la grafino morgaŭ ekkoleros kaj forpelos la administranton, tiam li kaj lia filino estos devigataj almozpeti . . . Tio ne estos plu ridiga, sed eĉ iel tragika. La patro ekkoleris kaj frapetis per sia forko kontraŭ telero; li kriis pri malordo en la bieno kaj flamiĝis, kvazaŭ la bieno apartenus al li mem; lia opinie, ĝin forvendi estis la plej urĝa afero: la grafino ruiniĝas, ŝi estas maljuna, kaprica, senvola; eĉ la vilaĝanoj ne donas plu buteron, ovojn kredite, timante, ke oni ne pagos al ili. La arbaristo kontraŭdiris: ne, ne, tute ne estas necese vendi

la bienon, same nobelan kaj maljunan, kiel la grafino mem; nur iom da mono — kaj ĉio estas bonega.

Mi pense skulevis la ŝultrojn. Kial li defendas la grafinojn? Ĉu eble al li tiel imponas la titolo, — aŭ li sentas dankemon, ĉar ŝi klopodas edzinigi Elan Tomaŝevskan kun li? . . . Poste mi ekhontis pri miaj pensoj kaj rekomencis mian brodadon.

La patro kaj Vorohoviĉ disputis nun pri ĉaso.

La sunsubiro estis purpura, bela. Same varma roza koloro kuŝis sur betuloj, aceroj, arbetoj. Multegaj kornikoj flugis apud la barilo, en la ĝardeno, super la kampo, kie amase nigriĝadis la neforveturigitaj betoj, kovritaj de sia propra putriĝanta foliaro.

Aŭtune mia koro plej doloras. Miaj pensoj intermiksiĝis kun rememoro, ke mi estas malriĉa, nebela, neju-na, kun ĉiamaj zorgoj pri hejtligno, pri truita domtegmento, rompita ŝtuparo. Ha, kiel nia dometo ruiniĝadis, ĉiutage, okulvideble! Grafina bienadministranto! Oni povus opinii lin grava persono, sed en realo . . . Ho, Dio!

Ni vivas kiel sovaĝuloj: tutajn monatojn ni neniun vidas, krom la grafino kaj la arbaristo. Mi ne ŝatas viziti ŝin, kvankam paĉjo tion postulas. Tute ne. Malaltaj, mallumaj ĉambroj,odoro de naftalino, polvo, katoj, tuta aro da hundetaĉoj, la kaduka grafino kun flartabakujo

kaj bluaj okulvitroj, malĝentila, akirema servistaro. Kiel ĉio ĉi estas malĝojiga, — eĉ rigardate deflanke! . . .

Mia patro ne volis forlasi la bienon pro dankemo: la grafino iam bonfaris al mia patrino, doninte al ŝi monrimedojn por studi en konservatorio. Panjo iam kantis en Varsovio, — tie ŝi ankaŭ mortis, aŭ eksterlande. Kiam mi estis ankoraŭ infano, mia vartistino diris, ke panjo agis malbone. Poste la opinioj estis diversaj: la grafino aprobis ŝin; la pastro asertis, ke scenejo estas peka; paĉjo opiniis, ke la profesio de aktorino estas nedeca okupo por nobelino. Kaj mi tute ne scias, ĉu panjo agis bone aŭ malbone, — mi supozas nur, ke libereco estas preferinda al nia kamparo kaj senlaŭteco. Kompatinda panjo! Ŝia portreto pendas super mia lito: ŝi estas blonda, blukula, kiel reĝino, en malhelverda, tre mallarĝa robo kun puntaĵo ĉirkaŭ la nuda kolo. Vorohoviĉ ravadmiris ŝin.

Ela Tomaŝevska havas la saman tipon, nur malpli delikatan. Tial kredeble, la maljuna grafino adoras Elan. Tamen al ŝi mankas afabla simpleco kaj bonaj manieroj. Ela estis edukita en provinca pensiono. Kaj mi nenie ricevis kompletan instruon kaj heredis de mia patrino nur ŝiajn manojn; Vorohoviĉ diras, ke ili estas "muzikemaj", — mi estas tre fiera pri tio.

Miaj pensoj ree sin turnis sur min mem. Mi ĉiam pensis, kiel mi povus eviti la humiligajn renkontojn kun la arbaristo. Kial li rigardas min tiel atente? Kiucele li estas kontenta, se li povas kaŭzi al mi malagrablaĵon? Kion malbonan mi faris al li finfine? Se li imagas . . . mi ja ne donis al li pretekston . . .

”Roza devas iri al la grafino,” — aŭdiĝas la intence laŭta voco de mia patro, ”ŝi devas . . . la grafino estas bona al ni, kiel anĝelo. Ni ŝuldas al ŝi ĉion.”

Ha, kara, naiva paĉjo! . . . Mi ne volis lin inciti, tial mi eliris el mia ĉambro, ĉirkaŭbrakis lian kolon, ordigis lian kravaton kaj kisis lian rozkoloran kalvaĵon.

”Mi malsanetas, paĉjo . . . iru mem . . . jen sinjoro Vorohoviĉ akompanos vin . . .”

La patro mildiĝis, sed la arbaristo mimike esprimis malpaciencon . . . eĉ malkontenton. Li kvazaŭ volus diri: ”Ne estas via afero, fraŭlino,” — sed sin detenis. Mi sentis, ke mi ruĝiĝas, kaj timis rigardi liaflanken.

Forirante, la patro diris:

”Roza, vi ne rajtas plori.”

Mi eĉ sufokiĝis! La patro estas ĉiam simplanima kaj nenion divenas. Sinjoro Vorohoviĉ fumis kaj ŝajnigis, ke li nenion aŭdis. Dankon al li!

Mi longe postrigardis ilin. La patro, malaltkreska, rondkorpa, en flava kostumo kun ruĝa koltuko — kaj

Vorohoviĉ, altkreska, belstatura, en ĉasista jako kun pafilo. Mi ekmemoris la blondan Elinjon . . . Jes, ili estas vere traftaŭga paro . . . Mi eksentis malvarmon.

Ekzistas nenio pli terura ol esti malbela. Kiam sinjoro Vorohoviĉ min rigardas, mi sentas la tutan malallogecon de mia pala, laca mieno, maldikaj ŝultroj kaj blue-nigraj haroj. (Mi estas certa, ke li ŝatas blondulinojn). Kaj mi hontas . . . mi hontas ĝis larmoj. . . Mi hontas pri ĉio . . . eĉ pri mia malnova vesto . . . Jes, estas penige, scii pri si mem, ke oni estas korpe malaminda . . . Ha! . . . Ela neniam spertos tion.

Malantaŭ la fenestro ade falis la velkintaj folioj, kaj min tuj ĉirkaŭkaptis tia korpremiga malĝojo, ke mi ekploris, ligis tuketon sur mian kapon kaj foriris en la arbareton. Mi sciis, ke mi havas eliron — doni konsenton al sinjoro Levkoviĉ. Tiam mi ne sentos plu la malriĉecon kaj ne ruĝiĝos pro honto antaŭ la arbaristo.

Levkoviĉ estas klera, monhava homo. Oni diras pri li nur bonon. Lia unua edzino mortis frue, kaj li adoras sian filineton. Li mem kaj la knabineto estis jam delonge simpatiaj por mi, — sed fiksa ideo pri Vorohoviĉ plene okupis mian cerbon, kaj mi ne povis liberigi min de ĝi.

Sed nuntempe mi sukcesis konvinki min mem. Estas ja necese malfermi la okulojn. Tridekjara . . . malbela . . . maldika . . . pala . . . sendota. Por kiu vi povas esti interesa, mia kara?

En la arbareto la betuloj staris orumitaj, kaj la aceroj estis jam defoliigintaj. . . ĉirkaŭe multege da mortintaj folioj, — iliaodoro, forta, aŭtuna, ĉiam plenigas la koron per neesprimebla malĝojo. Mortintaj folioj. . . Ha, kiel malgaja kaj samtempe bela emblemo de nia vivo! . Ĉi tie ankaŭ flugadis multe da kornikoj; ili vigle interparoladis kaj balanciĝis sur tiel maldikaj branĉetoj, ke ili ŝajnis tuj rompiĝontaj. Estis tute kviete, kvazaŭ la arbareto korenuis, kunpremiĝis kaj eĉ ne plendis.

Mi kelkajn fojojn rerigardis al la biendomo. Tie nun mia patro dismetas pacienciudon kun la grafino, kaj Vorohoviĉ petas Elan ludi fortepianon. Ŝi mokincitas lin, rifuzas, koketas, kaj ŝiaj okuloj brilas. Jes, mi scias, — estas tiel, tiel. . . Ju pli klare mi imagas ilin al mi kune, des pli dolore kunpremiĝas mia koro, kaj des pli konvinka fariĝas la neceso akcepti la proponon de Levkoviĉ.

La domo de Levkoviĉ staras tuj post la deklivo malantaŭ la arbareto, kaj lia magazeno sin trovas en la urbe-to, apud la stacidomo, je distanco de tri verstoj. Mi decidis, ke se mi renkontos Levkoviĉ sola apud lia pordego, tio estos bona antaŭsigno, kaj mi senprokraste diros "jes." Mi ne povis rememori lian vizaĝon, tiel ordinara ĝi ŝajnis al mi.

Mi ofte kroĉiĝis per mia jupo al sekaj branĉoj, kelkajn fojojn mi sidiĝis sur arbostumpoj kaj ploris. Kaj la folioj

senmanke ŝutiĝis, ŝutiĝis, mortante sen doloro, sen bedaŭroj, sen agonio, — kaj mi enviis ilin.

La vesperruĝo estingiĝis. Fariĝis malsekete. La arboj kvazaŭ fumiĝadis. Ekblovis venteto. La kornikoj ne interparolis plu, forflugis.

”A-u-u!”

Mi levis la kapon kaj tute ne ekmiris. Levkoviĉ proksimiĝis kun sia filino.

”Bonan vesperon,” — li ekkriis emocivoĉe ankoraŭ de malproksime, — ”bonan vesperon!”

Mi ekridetis. Lia knabineto estas tre ĝentila, en blua kaptuko kaj ĉelteksita vestaĵeto. ”Mia estonta duonfilino,” — mi ekmeditis, sentante nek ĝojon, nek miron, nek ĉagrenon. Ŝi premiĝis al sia patro, kaj li ridetis konfuzmiene. Li ne povis diveni, ĉu mi diros ”jes ”aŭ ”ne”. Liaj grandaj manoj estis malvarmaj kiel glacio, kaj li tuta kvazaŭ kuntiriĝis. Mi decidis eble plej rapide fini la aferon, — mia koro tro doloras, — kaj diris:

”Lasu Jonjon kuri antaŭen.”

La knabino obeis, kaj mi deklaris al Levkoviĉ mian decidon. Fariĝis pli facile, ol mi supozis.

Levkoviĉ ekmurmuris:

”Dio benu vin, fraŭlino Roza . . . malfeliĉan homon vi faras feliĉa.”

Kaj, sin klininte, li kisis mian veston. Tiam mi ektimis, rapide adiaŭis lin kaj iris hejmen, ne rerigardante. Mi min demandis: "Kial ci tion faris? Dio mia, kial ci tion faris?"

La folioj, la mortintaj folioj, susuris sub miaj piedoj mistere kaj indiferente. En la fenestroj de nia domo brilis lumo. Je mia miro mi trovis tie Vorohoviĉ. Li estis profunde enpenŝiĝinta kaj ne aŭdis mian revenon. Mi rigardis longe, dum kvinkelke da minutoj, lian belan, fieran kapon, lian malzorgan sintenon, la feltan ĉapon. Interne de mi ĉio ŝiriĝis, kaj mi demandis tra larmoj:

"Kio? Ĉu vi revenis, — ĉu vi estas tie ĉi?"

Li ekremetis, saltleviĝis kaj komencis ridi. Mi neniam estis aŭdinta, ke li tiel feliĉmiene ridus.

"Ah, fraŭlino Roza! . . . Fraŭlino Roza!"

Kaj etendis al mi la manojn.

Mi nenion komprenis. Al mi ŝajnis nur, ke tuj okazos io terura, kaj mi prenis seĝon. Sed li daŭre ridis kaj ripetis:

"Kie do vi estis tiel longe, karulino? Dio mia, mi atendas, arendas . . . kiom da ruzaĵoj mi elpensis, por forkuri de la grafino . . . Ah, fraŭlino Roza, fraŭlino Roza! . . ."

Vidante, ke mi silentas, li kvietiĝis kaj diris per karesoplana, profunda voĉo:

”Ĉu do vi ne divenas? . . . Ĉu vi divenas nenion, mia kara, mia bona! . . .”

Kaj mi respondis apenaŭ aŭdeble:

”Mi jam donis mian vorton al Levkoviĉ . . .”

Mi memoras nenion plu . . .

Anna Mar

El la rusa tradukis Andreo Fiŝer

La ambicia gasto

I un vesperon en septembro familio ariĝis ĉirkaŭ sia kameno kaj alte amasigis brulaĵon el naĝ-lignaĵo de montaj riveretoj, el sekaj pinkonusoj kaj frakasitaj ruinoj de arbegoj krake falintaj de la krutegaĵo. La fajro muĝis en la kamentubon kaj lumigis la ĉambron per sia larĝa flamo. La vizaĝoj de la gepatroj aspektis serene ĝojaj; la infanoj ridis; la plej aĝa filino estis la portreto de Feliĉo deksepjara; kaj la maljuna avino, kiu sidis ĉe la plej varma loko trikante, estis la portreto de Feliĉo maljuniĝinta. Ili jam trovis trikoloran violon en la plej sensirma loko en tuta Nov-Anglio. Ĉi tiu familio lokiĝis en la Noĉo en la Blankaj Montoj, kie la vento estas akra dum la tuta jaro, kaj senkompate malvarmega vintre, — donanta al ilia dometo sian tutan malmildecon antaŭ ol iri en la valon de la Sako. Ili loĝis en malvarma kaj danĝera loko; ĉar monto staris ture super iliaj kapoj, tiel kruta, ke ŝtonoj ofte brufalis sur ĝiajn flankojn kaj timigis ilin noktomeze.

La filino ĵus eldiris simplan ŝerceton, kiu plenigis ĉiujn per gajo, kiam la vento trairis la Noĉon kaj ŝajne paŭzis antaŭ ilia dometo — klakigante la pordon, kun sonoj malgajegaj kaj ĝemaj, antaŭ ol ĝi eniris la valon. Dum momento ĝi malĝojigis ilin, kvankam la tonoj ne estis nekutimaj. Sed la familio ĝojiĝis denove, kiam ili rimarkis, ke la anso estas levita de iu vojaĝanto, kies paŝoj estis neaŭditaj pro la malgaja ventoblovo kiu, muĝante dum li enpaŝis, anoncis lian proksimiĝon, kaj foriris for de la pordo kun plendaj tonoj.

Kvankam ili loĝis en tia soleco, ĉi tiuj homoj ĉiutage interparolis kun la mondo. La romantika pasejo de la Noĉo estas granda arterio, tra kiu la vivsango de interna komerco pulsadas inter Maine, unuflanke, kaj la Verdaj Montoj kaj la bordoj de la Sankta Laŭrenco, aliflanke. La diliĝenco ĉiam haltis antaŭ la pordo de la dometo. La vojaĝanto, sen akompananto krom sia bastono, paŭzis ĉi tie por interŝanĝi vortojn, por ke la sento de soleco ne tute subpremu lin, antaŭ ol li povos trapasi la fendon de la monto, aŭ atingi la unuan domon en la valo. Kaj ĉi tie la ŝarĝveturigisto, irante al la foiro ĉe Portland, haltis por noktumi, kaj, se li estus fraŭlo, eble sidus unu horon post la kutima horo de enlitiĝo, kaj, ĉe disiĝo, ŝtelkibus la knabinon de la monto. Ĝi estis unu el tiuj primitivaj gastejoj, kie vojaĝanto pagas nur por manĝaĵoj kaj dormejo, sed ricevas, krom tio, hejman

afablecon netakseblan. Kiam, do, la paŝoj aŭdiĝis inter la ekstera kaj interna pordoj, la tuta familio leviĝis, avino, infanoj, ĉiuj, kvazaŭ por bonvenigi parencon, kies sorto estis kunligita kun ilia.

Malfermis la pordon junulo. Lia vizaĝo unue portis melankolian esprimon, preskaŭ de malespero, de iu kiu vojaĝas sur sovaĝa kaj senŝirma vojo, ĉe noktiĝo kaj sola, sed ĝi rapide heliĝis, kiam li vidis la afablan varmon de la akcepto. Li sentis sian koron salti por renkonti ilin, de la maljunulino, kiu viŝis seĝon per sia antaŭtuko, ĝis la infaneto, kiu elmetis al li la braketojn. Unu rigardo kaj rideto faris la junulon senĝene amika kun la plej aĝa filino.

”Ha, ĉi tiu fajro estas ĝuste taŭga,” li kriis; ”precipe kiam ĉirkaŭ ĝi estas tia feliĉa rondo. Mi estas sensente malvarma; ĉar la Noĉo similas tubon de granda blovilo; terure blovegis kontraŭ mia vizaĝo sur la tuta vojo el Bartlett.”

”Do vi iras en la direkton de Vermont?” demandis la dommastro, helpante depreni malpezan tornistran de la ŝultroj de la junulo.

”Jes; al Burlington, kaj sufiĉe pli pluen,” respondis li. ”Mi intencis esti ĉe Ethan Crawford hodiaŭ nokte; sed piediranto malrapidas sur vojo, kia ĉi tiu. Ne estas grave; ĉar, vidante ĉi tiun bonan fajron, kaj viajn gajajn vizaĝojn, mi sentas kvazaŭ vi bruligis ĝin intence por mi

kaj atendis mian alvenon. Tial mi sidiĝos inter vi, kaj kondutos kvazaŭ hejme.”

La nekaŝema fremdulo ĵus altiris sian seĝon al la fajro, kiam io simila al peza piedsono aŭdiĝis de ekstere, rapidanta malsupren sur la kruta flanko de la monto kvazaŭ per longaj kaj rapidaj paŝoj, kaj dum ĝi preterpasis la dometon tiel salteganta, ke ĝi frapis la kontraŭan krutegaĵon. La familio tenis sian spiron, ĉar ili konis la sonon, kaj ilia gasto faris same instinkte.

”La maljuna monto jetis al ni ŝtonon, timante ke ni lin forgesos,” diris la domestro, reaplombiĝinte. ”Kelkfoje li skuas la kapon kaj minacas fali, sed de longe ni estas najbaroj kaj entute bone interkonsentas. Krom tio ni havas senriskan rifuĝejon tre proksime se li falus efektive.”

Ni nun supozu, ke la fremdulo jam finis sian noktomanĝon el viando ursa; kaj pro sia nature feliĉa maniero akceptiĝis de la tuta familio kun afableco, tiel ke ili interparolis tute senĝene inter si, kvazaŭ li apartenus al ilia monta gento. Li estis de fiera, tamen milda spirito — memestima kaj netrudema inter la riĉaj kaj grandaj, sed ĉiam preta klini la kapon ĉe humila pordo dometa, kaj esti kiel frato aŭ filo apud la kameno de neriĉulo. Inter la domanoj de la Noĉo li trovis varmecon kaj simplecon de sento, la kutiman saĝecon de Nov-Anglio, kaj poezion de loka kresko, kiujn ili kolektis tute senkonscie de

la montaj pintoj kaj faŭkoj, kaj ĉe la sojlo mem de sia romantika kaj danĝera loĝejo. Li jam multe vojaĝis, kaj sola; lia tuta vivo, ja, estis soleca vojeto, ĉar laŭ la fiera zorgo de sia naturo, li tenis sin for de tiuj, kiuj alie povus esti liaj kunuloj. La familio, ankaŭ, kvankam tiel afabla kaj gastema, havis tian konscion de unueco inter si, kaj apartiĝo de la cetera mondo, kiu, ĉe ĉiu familia rondo, devas konservi sanktan lokon, kien neniu fremdulo povas sin entrudi.

Sed ĉi tiun vesperon profeta simpatio instigis al la delikata kaj klera junulo, ke li elverŝu sian koron al la simplaj montanoj, kaj devigis ilin respondi al li kun la sama libera konfido. Kaj tiel devus esti. Ĉu la parenceco de komuna sorto ne estas pli forta kunigilo ol tiu de naskiĝo?

La sekreto de la karaktero de la junulo estis alta kaj abstrakta ambicio. Li estus kontenta vivi nefaman vivon, sed ne volus esti forgesata en la tombo. Sopiropi transformiĝis en esperon, kaj espero, longe karesata, fariĝis kvazaŭ realaĵo, ke nekonata kiel li nun vagadas, iu glorio radios sur lian tutan vojon, kvankam eble ne dum li pasos ĝin. Sed kiam posteuloj posten rigardos en la malhelecon, kiu estas nun la estanteco, ili postsekvos la helecon de liaj paŝoj, heliĝantaj, dum malpli helaj glorioj velkis, kaj konfesos, ke geniulo pasis el sia lulilo al sia tombo, dum neniu rimarkis lin.

”Ankoraŭ,” kriis la fremdulo — liaj vangoj ruĝiĝantaj kaj liaj okuloj briletantaj pro entuziasmo — ”ankoraŭ mi nenion faris. Se mi malaperus de la tero morgaŭ, neniu scius tiom pri mi kiom vi; ke iu sennoma junulo venis ĉe noktiĝo el la valo de la Sako, malfermis sian koron al vi en la vespero, trapasis la Noĉon antaŭ sunleviĝo, kaj jam ne vidiĝis. Neniu demandus: Kiu li estis? Kien iris la vaganto? Sed mi ne povos morti antaŭ ol mi plenumos mian destinon. Tiam la morto venu! Mi estos konstruinta mian monumenton!

Estis fluado de natura emocio, ŝprucanta inter abstraktaj revoj, kiu ebligis, ke la familio komprenu la sentojn de la junulo, kvankam iliaj estis tiel fremdaj al la liaj. Pro subita sentemo pri la ridindaĵoj, li ruĝiĝis pro la ardo en kiun li lasis sin fali.

”Vi ridas je mi,” li diris, prenante la manon de la plej aĝa filino kaj samtempe ridetante. ”Vi opinias, ke mia ambicio estas tiel sensenca, kvazaŭ mi ĝismorte frostigus min sur la pinto de Monto Washington, por ke homoj rigardu min de la kamparoj ĉirkaŭaj. Kaj vere tiu estus majesta piedestalo por statuo de homo!”

”Estas pli bone sidi apud ĉi tiu fajro,” respondis la knabino, ruĝiĝante, ”kaj esti komforta kaj kontenta, kvankam neniu pensas pri ni.”

”Mi supozas,” diris la patro, post iom da medito, ”ke estas io natura en tio, kion diras la junulo; kaj se mia

penso tiel inkliniĝus, mi eble sentus tute same. Estas strange, edzino, kiel lia babilado igas mian kapon pensi pri aferoj, kiuj preskaŭ certe neniam okazos.”

”Eble ili okazos,” respondis la edzino. ”Ĉu mia edzo pensas pri tio, kion li faros, kiam li estos vidvo?”

”Ne, ne!” kriis li, forpelante la ideon kun riproĉa mildeco. ”Kiam mi pensas pri via morto, Ester, mi ankaŭ pensas pri mia. Sed mi volis, ke ni posedu bonan farmon ĉe Bartlett, aŭ Bethlehem, aŭ Littleton, aŭ iu alia urbo ĉirkaŭ la Blankaj Montoj; sed ne kie ili povus fali sur niajn kapojn. Mi dezirus bonan reputacion inter miaj najbaroj, esti nomata ”Squire,” kaj sendata al Ĝenerala Kortego por unu-du kunsidaroj; ĉar simpla, honesta viro povus fari tiom da bono tie kiom leĝisto. Kaj kiam mi fariĝus tre maljuna, kaj vi maljunulino, por ke nek vi nek mi estu longe sola, mi povus morti tute feliĉa en mia lito, kaj lasi vin ĉiujn plori ĉirkaŭ mi. Tomboŝtono el ardezo taŭgus por mi same bone kiel unu el marmoro — kun nur mia nomo kaj aĝo, strofo de himno, kaj io por sciiĝi al la homoj ke mi vivis kiel honestulo kaj mortis kristano.”

”Jen do,” kriis la fremdulo, ”estas nature al ni deziri monumenton, ĉu el ardezo an el marmoro, ĉu kolono el granito aŭ glora memoro en la universala koro de homoj.”

”Ni strange pensas hodiaŭ vespere,” diris la edzino, kun larmoj en la okuloj. ”Oni diras, ke antaŭsigniĝas io, kiam la pensoj tiel vagadas. Aŭskultu la infanojn!”

Ili aŭskultis, laŭ la peto. La pli junaj infanoj jam estis enlitigitaj en apuda ĉambro, sed inter ili nur estis nefermita pordo, tial estis aŭdeble, ke ili babiladas multe inter si. Ĉiuj ŝajnis influataj de la apudfajra rondo, kaj penis konkuri unu kontraŭ la alia per kapricaj volo kaj infanaj projektoj pri tio, kion ili faros, kiam ili fariĝos viroj kaj virinoj. Fine malgranda knabo, anstataŭ paroli al siaj gefratoj, vokis sian patrinon.

”Mi diros al vi kion mi volas, patrino,” kriis li. ”Mi deziras, ke vi, patro, avino, kaj ĉiuj ni, kaj ankaŭ la fremdulo, ekiru tuj kaj prenu trinkon el la pelvo de la akvokondukilo!”

Neniu el ili povis ne ridi je la ideo de la infano forlasi varman liton, kaj tiri sin for de gajiga fajro, por viziti la pelvon de la akvokondukilo — rivereto falanta de la kruteĝaĵo, profunde en la Noĉo. La knabo estis apenaŭ parolinta, kiam sarĝveturilo aŭdigis klakante sur la vojo, kaj haltis momenton antaŭ la pordo. Ĝi ŝajnis enhavi du aŭ tri virojn kiuj gajigis siajn korojn per kruda ĥoro de kanto, kiu eĥe resonis, en rompitaĵoj, inter la kruteĝaĵoj, dum la kantantoj hezitis ĉu daŭrigi sian veturon aŭ loĝi ĉi tie dum la nokto.

”Patro,” diris la knabino, ”ili vokas vin laŭ via nomo.” Sed la bonulo dubis, ĉu ili vere vokis lin, kaj ne deziris montri sin tro gajnema per peto ke ĉiu patronu lian domon. Tial li ne rapidis al la pordo; la vipŝnuro baldaŭ ekkrakis, kaj la veturantoj malaperis en la Noĉon, ankoraŭ kantante kaj ridante, kvankam ilia muziko kaj gajeeco revenis plende de la koro de la monto.

”Ja, patrino!” kriis la knabo, denove. ”Ili estus permesintaj al ni rajdi ĝis la akvokondukilo.”

Denove ili ridis je la obstina deziro de la infano por nokta promenado. Sed okazis, ke nubeto pasis trans la spirito de la filino; ŝi serioze rigardis en la fajron, kaj faris enspiron, kiu estis preskaŭ ekĝemo. Ĝi perfortis sian vojon, malgraŭ malforta barakto por ĝin reteni. Poste, subite ruĝiĝante, ŝi rigardis ĉirkaŭ la rondo, kvazaŭ ili estus momente rigardintaj en sian animon. La fremdulo demandis al ŝi, kion ŝi pensas.

”Nenion,” respondis ŝi, kun melankolia rideto. ”Mi nur sentis min soleca tiumomente.”

”Ho, ĉiam mi havis naturan kapablon senti, kio estas en la koroj de aliaj,” li diris, duone serioze. ”Ĉu mi diru la sekretojn de via? Ĉar mi scias, kion konkludi, kiam junulino tremetas apud varma fajro kaj plendas pri soleco ĉe la flanko de la patrino. Ĉu mi metu en vortojn tiujn sentojn?”

”Ili ne plu estus sentoj de knabino, se ili povus esti vortigataj,” respondis la monta nimfo, ridante, sed evitante lian okulon.

Ĉi tio estis dirata flanke. Eble en iliaj koroj ĝermis amo, tiel pura ke ĝi povus flori en Paradizo, ĉar ĝi ne povus maturiĝi sur la tero; ĉar virinoj adoras tian mildan dignon, kiel la lia; kaj fiera, pripensema, tamen afabla animo estas plej ofte ensorĉata de simpleco kiel ŝia. Sed dum ili mallaŭte parolis, kaj li observis la feliĉan malgajecon, la facilajn ombretojn, la timemajn sopirojn de la knabina naturo, la vento tra la Noĉo faris pli profundan kaj malgajan sonon. Ĝi ŝajnis, kiel la fantaziema fremdulo diris, kiel ĥora kanto de la spiritoj de la blovego, kiuj dum antikvaj indianaj tempoj loĝis en ĉi tiuj montoj, kaj faris iliajn altaĵojn kaj kavojn sankta regiono. Estis malĝoja sono laŭ la vojo, kvazaŭ pasus enteriga procesio. Por forigi la malgajecon, la familio ĵetis pinbranĉojn sur la fajron, ĝis la sekaj folioj kraketis kaj la flamo leviĝis, vidigante denove scenon de paco kaj humila feliĉo. La lumo svebis ĉirkaŭ ili milde kaj karesis ĉiujn. Jen estis la malgrandaj vizaĝoj de la infanoj, kaŝrigardantaj el sia lito aparte, kaj jen la figuro fortika de la patro, la subigita kaj zorgema mieno de la patrino, la albrova junulo, la burĝonanta knabino, kaj la bona avino, ankoraŭ trikanta ĉe la plej varma loko. La maljuna

virino suprenrigardis de sia tasko, kaj, kun fingroj ĉiam okupataj, kiel unua denove parolis.

”Maljunuloj havas siajn ideojn,” diris ŝi, ”same kiel junuloj. Vi volis kaj planis, kaj lasis viajn pensojn vagi de unu temo ĝis alia, ĝis vi vagigis ankaŭ mian pensadon. Nu, kion maljunulino devus deziri, kiam ŝi povas iri nur paŝon aŭ du antaŭ ol atingi sian tombon? Infanoj, ĝi fantome sekvas min dum nokto kaj tago ĝis mi sciigos al vi.”

”Kio tio estas, patrino?” kriis la geedzoj samtempe.

Tiam la maljunulino, kun mieno de mistero, kiu altiris la ĉirkaŭsidantojn pli proksimen al la fajro, sciigis al ili, ke ŝi jam preparis siajn tombajn vestojn antaŭ kelkaj jaroj — delikatan tolan mortkitelon, ĉapon kun muslina krispo, kaj ĉion el pli delikata ŝtofo, ol ŝi portis de post la edziniĝa tago. Sed ĉi tiun vesperon malnova superstiĉo strange revenis al ŝi. Oni diris en ŝiaj pli junaj tagoj, ke se io estus neorda ĉe kadavro, se nur la krispo ne estus glata aŭ la ĉapo ne ĝuste bonsidus, la kadavro en la ĉerko kaj sub la grundo penus suprenmeti siajn malvarmajn manojn por ordigi ĝin. Ŝi farigis nerva ĉe la nura penso.

”Ne tiel parolu, avino!” diris la knabino, tremetante.

”Nu,” daŭrigis la maljunulino kun nekutima seriozecco, tamen strange ridetante pri sia malsaĝetaĵo: ”Mi de-

ziras, ke unu el vi, miaj infanoj — kiam via patrino estos vestita kaj jam en la ĉerko — mi deziras, ke unu el vi tenu super mia vizaĝo spegulon. Kiu scias, ĉu eble mi rigardos al mia reflektajo por vidi, ĉu ĉio estas orde?”

”Maljuna kaj juna, oni revas pri tomboj kaj monumentoj,” murmuris la fremda junulo. ”Mi demandas al mi, kion sentas la maristoj, kiam ŝipo dronas, kaj ili, nekonataj kaj nefamaj, estas subigotaj kune en la oceano — tiu vasta kaj sennoma tombego?”

Dum momento la terura koncepto de la maljunulino tiel absorbis la pensojn de ŝiaj aŭskultantoj, ke sono vaganta en la nokto, leviĝanta kiel la muĝo de blovego, jam kreskis larĝa, profunda kaj terura, antaŭ ol la mortdestinita grupo konsciis pri ĝi. La domo kaj ĉio interne tremis; la fundamentoj de la mondo ŝajnis skuitaj, kvazaŭ ĉi tiu terura sono estus la sonorado de la lasta trumpetado. Juna kaj maljuna intersanĝis unu ekrigardon de teruro, kaj restis dum momento, palaj, timigitaj, sen povo paroli aŭ moviĝi. Tiam la sama ekkriego samtempe eksplodis el la lipoj de ĉiuj.

”La glito! La glito!”

La plej simplaj vortoj devas sciigi, sed ne bildigi, la nedireblan teruron de la katastrofo. La viktimoj elkuregis el la dometo kaj serĉis rifuĝon en, laŭ ilia opinio, pli sendanĝera loko — kie, antaŭpensinte tian krizon, spe-

co de barilo jam estis konstruita. Ve! ili forlasis sian sendanĝerejon, kaj enkuris rekte en la vojon de detruo. Falis la tuta flanko de la monto, en kaskadego de ruino. Tuj antaŭ ol ĝi atingis la dometon, la fluo rompiĝis en du partojn — ĝi eĉ ne rompis unu fenestron tie, sed superkovris la tutan ĉirkaŭaĵon, obstrukcis la vojon, kaj neniigis ĉion dum sia furioza kuro. Longe antaŭ ol la tondro de la granda glito ĉesis muĝi inter la montoj, la morta agonio estis suferita kaj la viktimoj estis en paco. Iliaj korpoj neniam estis trovitaj.

La proksiman matenon hela fumo vidiĝis eliranta el la kamentubo de la dometo sur la monta flanko. Interne la fajro ankoraŭ fumetadis sur la kameno, kaj la seĝoj staris cirkle ĉirkaŭ ĝi, kvazaŭ la enloĝantoj nur estis elirintaj por vidi la detruon faritan de la glito, kaj baldaŭ revenos, por danki la Ĉielon pro mirakla savo. Ĉiu lasis siajn apartajn memoraĵojn, pro kiuj tiuj konintaj la familion devis elverŝi larmon por ĉiu. Kiu ne estas aŭdinta ilian nomon? La historio estas malproksimen disvastigita, kaj eterne restos legendo de tiuj montoj. Poetoj kantis pri ilia sorto.

Estis cirkonstancoj, kiuj supozigis al kelkaj homoj, ke fremdulo estis akceptita en la dometon en tiu terura vespero kaj partoprenis en la katastrofo de ĝia loĝantaro. Aliaj neis, ke estas sufiĉa bazo por tia konjekto. Ve

por la grandanima junulo, kun lia revo pri tera senmorteco! Lia nomo kaj persono tute nekonataj; lia historio, lia maniero de vivo, liaj planoj, mistero neniam klarigebla, lia morto kaj lia ekzistado same dubaj! Kies estis la angoro de tiu momento de morto?

Nathaniel Hawthorne

El la angla tradukis E. E. Yelland

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-202-6